

NEĜULINO

KAJ ALIAJ FABELOJ

DE

FRATOJ GRIMM

Tradukis el la germana lingvo
D-ro KABE

S.A.T.
2007



Por SAT-Broŝurservo, presis: Baudé, FR-47470 Beauville

NEGULINO

KAJ ALIAJ FABELOJ

DE

FRATOJ GRIMM

TRADUKIS EL LA GERMANA LINGVO

D-RO KABE

ILUSTRITA DE A. LANGEBERG

KVARA ELDONO

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

67, Av. Gambetta, FR-75020 PARIS

Sensanĝe represis laŭ la eldono de SAT/FLE, 1939:

SAT-Broŝurservo, FR-47470 Beauville

2007

ANTAŬPAROLO DE LA ELDONANTOJ.

La kreskanta interesiĝo por Esperanto inter la junularo kaj infanaro sentigis la bezonon al por-infana literaturo en Esperanto. Ni ĝojas povi kontribui al forigo de tiu manko, reeldonante la famkonatajn fabelojn de fratoj Grimm, en la modela traduko de K a b e. Ĉi tiu libro estas nova pruvo de lia tradukarto, ĉar li sukcesis traduki la fabelojn en simpla kaj bonstila lingvo. Lia traduko estas modelo por multaj aliaj tradukantoj!

La unua eldono en Esperanto aperis jam en 1906a kaj enhavis 28 fabelojn. El ili ni nun elektis 14 kaj komisiis al la desegnisto A. L a n g e b e r g ilustri ilin.

S-ro Fr. Ellersiek, la eldonisto de la unua eldono, afable permesis al ni la represon. Ni kore dankas lin pro tio!

La Literatura Komitato de F.L.E. kontrolis la tradukon por forigi preserarojn kaj arkaikaĵojn. (vidu la rimarkojn en la fino de la libro).

Se montriĝos interesiĝo por la nuna kolekto, ni eldonos en dua volumo ankaŭ la ceterajn fabelojn.

Ke la fabeloj de fratoj Grimm donu distron kaj instruon al la legontoj, deziras

Majo 1939a.

L a E l d o n a n t o j .

ENHAVO:

	paĝo
Antaŭparolo de l'tradukinto.	7
Neĝulino	9
Lupo kaj sep kapridoj	18
Reĝo rano aŭ fera Henriko	21
Ora birdo	25
Feliĉa Joĉjo.	32
Joĉjo kaj Margenjo	37
Steloj Talaroj.	44
Fiŝkaptisto kaj lia edzino.	45
Cindrulino	53
Tablo „kovru vin”	60
Fabelo pri iu, kiu migris por ekkoni la timon	70
Knabo-Fingro.	79
Sesope oni trairas la tutan mondon	85
Tri fratoj.	90
Rimarkoj de la Literatura Komitato.	93

ANTAŬPAROLO DE L' TRADUKINTO.

La patrujo de la fabelo estas la oriento; la nacia karaktero kaj maniero de l' vivado de la orientaj popoloj estas la kaŭzo de l' fakto, ke ankoraŭ hodiaŭ la verkado de fabeloj estas tie tre alte ŝatata. Longe oni opiniis erare, ke la fabelo venis en la okcidentajn landojn nur post la krucmilitoj; en la realeco oni trovas fabelojn jam ĉe la antikvaj popoloj (Plato „La ringo de Gigas”). La unuaj kolektoj de fabeloj aperis en Italujo (en la dekseca jarcento — Straparola „Tredici piacevoli notti”; en la deksepa — Giambattista Basile „Pentamerone”). En Francujo en la fino de la deksepa jarcento aperis la tutmonde konataj fabeloj de Perrault (Contes de la mère l'Oye) kaj la traduko de Galland de „Mil kaj unu noktoj” — la fama kolekto de arabaj fabeloj. Similaj kolektoj ekzistas en ĉiuj lingvoj de la civilizita mondo, sed la plej fama en la tutmonda literaturo estas la verko de fratoj Grimm: „Kinder- und Hausmärchen” („Infanaj kaj hejmaj fabeloj”), eldonita en la jaroj 1812^a—1813^a. La ĉefa merito de fratoj Grimm estas unue, ke ili sukcesis kolekti tiel grandan nombron da fabeloj, kaj due, ke ili efektive *kolektis* ilin: kun respekta pietismo ili skribis tion, kion ili aŭdis de popolaj rakontantoj, ŝanĝante nenion, eĉ konservante iafoje la popolan dialekton. Ke la fabeloj estis efektive kolektitaj de fratoj Grimm kaj *diktitaj* de kamparaj rakontantoj, — tion plej bone montras la sekvanta fragmento el la antaŭparolo de fratoj Grimm:

„Ni havis la feliĉon koni en la vilaĝo Niederrzwehrn, proksime de Cassel, kamparaninon, al kiu ni ŝuldas la plej belajn rakontojn de nia dua volumo. Ŝi estis edzino de bestedukanto: ŝi estis ankoraŭ plena de vikleco kaj ne havis pli ol kvindek jarojn. Ŝi konservis bonege en sia memoro ĉiujn malnovajn legendojn kaj certigis, ke ĉi tiun kapablon posedas ne ĉiu kaj ke multaj ne

ANTAŬPAROLO DE L' TRADUKINTO

povas ilin memori. Ŝi rakontadis nerapide, sen ŝanceliĝo, kun grandega plezuro; se oni petis, ŝi ripetis la rakontojn sufiĉe malrapide, por ke oni povu skribi post ŝia diktado. Multajn el niaj fabeloj ni notis tiamaniere vorton post vorto. Tiuj, kiuj opinias, ke la tradicioj rapide malaperas kaj ke la malzorgo, kun kiu oni komunikas ilin, malhelpas longan daŭradon de ili, estus ekkonintaj sian eraron, aŭskultante nian rakontantinton: tiel ŝi konservis ĉiam la samajn esprimojn kaj zorgis ilian precizecon."

La rakontoj de fratoj Grimm, kiel ĝenerale ĉiuj fabeloj, plej multe plaĉas al infanaj legantoj; ĉi tiu fakto estas facile klarigebla: dank' al siaj naiva kredo kaj impresiĝemo la infanoj ne sole legas la rakontojn, sed *vivas* kun la herooj de la fabeloj. Ĉu en nia infaneco ni ne ploris la senvivan Neĝulinon kaj ne gardis kun la strigo, kolombo kaj korvo ŝian ĉerkon? Ĉu ni ne ĝojis kun la fidela Henriko pro la liberiĝo de la reĝo rano kaj ĉu ankaŭ de nia malgranda koro ne falis la tri feraj ringoj unu post la alia? Ĉu ne indignigis nin la nesatigebla postulemo de la edzino de l' fiŝkaptisto, al kiu ne sufiĉis eĉ la papa trono, kaj ĉu ni ne estis kontentaj, kiam ŝi devis ree loĝi en sia budo? Ĉu ni ne tremis, ke la lupro trovos la kapridon, kiu sin kaŝis en la horloĝo kaj ĉu ni ne ridis la punitan sangavidan beston, ripetante ĝiajn plendojn:

„Ah, en ventro kia pezo!
Sentas ŝtonojn mi en mezo:
La kapridojn mi ja manĝis,
Kiu ilin tie ŝanĝis?”

Sed ne sole la infanoj legas kun plezuro la Grimm'ajn fabelojn, ankaŭ la maturaj homoj ŝatas ilin: unuj kiel simplan, facilan legaĵon, kiu agrable ripozigas la cerbon, aliaj kiel materialon por folkloraj studoj, fine la maljunuloj — por veki la rememorojn kaj per la penso ree travivi la antaŭ longe pasintan infanecon.

Varsovio, junio 1906a.

K a b e.



Neĝulino

Ĝi okazis iam en la mezo de l' vintro. La neĝaj flokoj falis de l' ĉielo kvazaŭ plumoj. Reĝino sidis ĉe fenestro, kiu havis nigran ebonan kadron, kaj kudris. Ŝi levis la okulojn, ekrigardis la ĉielon kaj en la sama momento ŝi pikis sian fingron per la kudrilo. Tri sangaj gutoj falis sur la neĝon. La ruĝo tiel bele kontrastis la blankan neĝon, ke ŝi ekpensis: „Se mi havus infanon tiel blankan kiel la neĝo, tiel ruĝan kiel la sango kaj tiel nigran kiel la ligno de l'kadro!” Baldaŭ poste Dio sendis al ŝi filineton, kiu estis tiel blanka kiel la neĝo, tiel ruĝa kiel la sango, kaj tiel nigrahara kiel la ebono. Oni nomis ŝin Neĝulino. Tuj kiam naskiĝis la infano, la reĝino mortis.

Post unu jaro la reĝo prenis alian edzinon. Ŝi estis bela virino, sed fiera kaj malmodesta. Ŝi ne povis toleri, ke iu superas ŝin en beleco. Ŝi havis miraklan spegulon. Ĉiufoje kiam ŝi ekstaris antaŭ ĝi kaj demandis:

„Speguleto mia, speguleto hela,
Kiu en la lando estas la plej bela?”

ĝi respondis:

„Vi reĝino, vi estas ĉe ni la plej bela!”

Tiam ŝi estis kontenta, ĉar ŝi sciis, ke la spegulo diras la veron. Neĝulino kreskis kaj fariĝis pli kaj pli bela. Kiam ŝi estis

NEGULINO

sepjara, ŝi estis tiel bela, kiel la hela tago, pli bela ol la reĝino mem. Kiam ĉi tiu demandis foje sian spegulon:

„Speguleto mia, speguleto hela,
Kiu en la lando estas la plej bela?“

ĝi respondis:

„Plej bela vi estas ĉe ni, ho reĝino,
Sed miloble pli bela estas Neĝulino.“

La reĝino ektimis kaj fariĝis flava kaj verda pro envio. De ĉi tiu momento ĉiufoje kiam ŝi ekvidis Neĝulinon, la koro turniĝis en ŝi pro malamo al la knabino. La envio kaj fiero kreskis kvazaŭ malbonaj herboj en ŝia koro, tiel ke ŝi ĝuis trankvilon nek tage, nek nokte. Ŝi alvokis ĉasiston kaj diris: „Forkonduku la infanon en la arbaron, mi ne volas plu vidi ĝin antaŭ miaj okuloj. Mortigu ĝin kaj alportu al mi la pulmojn kaj la koron kiel pruvon de l' plenumo de mia ordono.“ La ĉasisto devis obei. Li forkondukis la reĝidinin, streĉis la pafarkon kaj jam estis trapikonta la senkulpan koron de Neĝulino, kiam ŝi ekploris kaj diris: „Kara ĉasisto, lasu al mi la vivon, mi forkuros en la sovaĝan arbaron kaj neniam revenos hejmen.“ Ŝi estis tiel bela, ke la ĉasisto ekkompatis ŝin kaj diris: „Forkuru, malfeliĉa infano.“ „Baldaŭ diŝiros vin la sovaĝaj bestoj,“ pensis li kaj tamen li sentis, kvazaŭ peza ŝtono defalis de lia koro, ke li ne devas mortigi ŝin. En la sama momento juna aprido kuris preter li. Li ĝin mortigis, elprenis la pulmojn kaj la koron kaj alportis ilin al la reĝino. La kuiristo devis kuiri ilin kun salo, kaj la malica virino manĝis ilin, pensante, ke ŝi manĝas la pulmojn kaj la koron de Neĝulino.

La malfeliĉa infano restis tute sola en la arbaro. Teruro ekregis ŝin. Ŝi rigardis la arbajn foliojn, kvazaŭ serĉante de ili konsilon. Ŝi ekkuris inter pintaj ŝtonoj kaj dornoj, kaj la sovaĝaj bestoj saltis preter ŝi, sed ne atakis ŝin. Ŝi kuris tiel longe, kiel la piedoj povis porti ŝin. Noktiĝis. Ŝi ekvidis malgrandan dometon kaj eniris por ripozi. En la dometo ĉio estis malgranda, sed

NEĜULINO

tiel beleta kaj pura, ke ne eble estas tion priskribi. Tie staris tableto kovrita per blanka tuko kaj sur ĝi sep malgrandaj teleroj, ĉiu telere to kun sia forketo, krom tio sep tranĉiletoj kaj forketoj, sep malgrandaj glasoj. Apud la muro estis en vico sep litetoj, sur ĉiu estis sternita blanka tuko. Neĝulino malsata kaj soifanta manĝis de ĉiu telere to iom da legomoj kaj da pano kaj trinkis el ĉiu glaso guton da vino, ĉar ŝi ne volis forpreni ĉion de unu. Poste, tre laca, ŝi kuŝiĝis sur liton; sed neniu taŭgis, unu estis tro longa, alia tro mallonga; fine la sepa estis bona, ŝi kuŝiĝis sur ĝin, alvokis la benon de Dio kaj ekdormis.

Kiam tute mallumiĝis, venis la mastroj de l' dometo, sep malgrandeguloj, fosistoj de metaloj en la montoj. Ili eklumigis siajn sep kandelojn kaj en la hela lumo rimarkis, ke iu fremda estis ĉe ili, ĉar ne ĉio estis en ordo, kia ili ĝin lasis. La unua demandis: „Kiu sidis sur mia seĝeto?” La dua: „Kiu manĝis de mia telere to?” La tria: „Kiu demordis de mia pano?” La kvara: „Kiu manĝis de miaj legomoj?” La kvina: „Kiu uzis mian forketon?” La sesa: „Kiu tranĉis per mia tranĉileto?” La sepa: „Kiu trinkis el mia pokaletto?” La unua ĉirkaŭrigardis, rimarkis sur sia lito postesignon de malgranda piedo kaj diris: „Kiu eniris en mian liton?” La aliaj alkuris kaj ekkriis: „Ankaŭ en la mia iu kuŝis.” La sepa ekrigardante sian liton, ekvidis sur ĝi Neĝulinon dormantan. Li alvokis la aliajn, ili alkuris kaj ekkriis pro miro. Ili alportis siajn sep kandelojn kaj lumigis Neĝulinon. „Mia Dio, mia Dio!” kriis ili „kiel bela infano!” Ili tre ĝojis, ne vekis ŝin, kaj ŝi dormis en la liteto. La sepa malgrandegulo dormis kun siaj kunuloj, kun ĉiu unu horon, kaj tiel pasis la nokto.

Matene Neĝulino vekigis kaj, ekvidinte la sep malgrandegulojn, ektimis. Sed ili amike demandis: „Kiel oni nomas vin?” „Neĝulino.” „Kiamaniere vi venis en nian domon?” daŭrigis ili la demandojn. Ŝi rakontis al ili, ke ŝia duonpatrino volis pereigi ŝin, sed la ĉasisto ŝin ekkompatis; ke ŝi kuris la tutan tagon, ĝis fine ŝi trovis ĉi tiun dometon. La malgrandeguloj diris al ŝi: „Se

NEĜULINO

vi mastrumos en nia domo, kuiros, lavos, kudros, trikos, zorgos pri ordo kaj pureco, vi povas resti ĉe ni, kaj nenio al vi mankos.” „Bone, tre volonte” respondis Neĝulino kaj restis ĉe ili. Ŝi mastrumis kaj zorgis pri la ordo en la domo; la malgrandeguloj iris ĉiumatene en la montojn kaj serĉis oron, vespere ili revenis, kaj la manĝaĵo devis esti preta. La tutan tagon la knabino estis sola, la bonaj malgrandeguloj avertis ŝin kaj ĉiam diris: „Gardu vin kontraŭ via duonpatrino. Ŝi baldaŭ ekscios, ke vi estas tie ĉi; enlasu nenion.”

La reĝino opiniis, ke ŝi manĝis la pulmojn kaj la koron de Neĝulino kaj tial ŝi estis certa, ke ŝi ree estas la unua kaj plej bela. Ŝi ekstaris antaŭ la spegulo kaj diris:

„Speguleto mia, speguleto hela,
Kiu en la lando estas la plej bela?”

La spegulo respondis:

„Vi estas plej bela ĉe ni, ho reĝino,
Sed trans montoj kaj rivero
Sur la de l' pigmeoj tero
Miloble pli bela estas Neĝulino.”

La reĝino ektimis, ĉar ŝi sciis, ke la spegulo neniam mensogas. Ŝi komprenis, ke la ĉasisto trompis ŝin kaj ke Neĝulino ankoraŭ vivas. De tiu momento ŝi pensis kaj pensis senĉese, kiel pereigi Neĝulinon, ĉar dum ŝi ne estis plej bela en la lando, la envio ne lasis ŝin trankvila. Fine ŝi ion elpensis. Ŝi kolorigis sian vizaĝon kaj vestis sin kiel maljuna butikistino. Ŝi fariĝis tute ne rekonebla. Aliformigita tiamaniere ŝi iris trans la sep montojn al la sep malgrandeguloj, frapis la pordon kaj ekkriis: „Bela komercaĵo malkara, malkara!” Neĝulino elrigardis tra la fenestro kaj diris: „Bonan tagon! Kion vi vendas?” „Bonan komercaĵon, belan komercaĵon! Laĉojn de ĉiuj koloroj” respondis la duonpatrino kaj montris laĉon plektitan el multkolora silko. „Mi ja

NEĜULINO

povas enlasi la bonan virinon” pensis Neĝulino, malriglis la pordon kaj aĉetis la belan laĉon. „Mia infano!” diris la maljunulino, „ne tiell venu, mi mem laĉos vin.” Neĝulino suspektis nenion, stariĝis antaŭ ŝi kaj lasis sin laĉi per la nova laĉo. La duonpatrino laĉis rapide kaj tiel forte, ke al Neĝulino mankis la spiro kaj ŝi falis kiel senviva. „Nun vi ne estos plu la plej bela,” diris la reĝino kaj forkuris.

Post momento la malgrandeguloj revenis hejmen por vespermanĝi. Kiel ili ektimis, kiam ili ekvidis amatan Neĝulinon sur la planko! Ŝi ne moviĝis, kvazaŭ senviva. Ili levis ŝin kaj rimarkinte, ke ŝi estas tro forte laĉita, tratanĉis la laĉon. Ŝi komencis spiri, kaj iom post iom revenis la vivo. Kiam la malgrandeguloj eksciis, kio okazis, ili diris: „La maljuna butikistino estis neniua alia, ol la sendia reĝino. Gardu vin kaj enlasu neniun dum nia foresto.”

La malbona virino, reveninte hejmen, iris al la spegulo kaj demandis:

„Speguleto mia, speguleto hela,
Kiu en la lando estas la plej bela?”

La spegulo respondis kiel ordinare:

„Vi estas plej bela ĉe ni, ho reĝino,
Sed trans montoj kaj rivero
Sur la de l' pigmeoj tero
Miloble pli bela estas Neĝulino.”

Kiam ŝi tion aŭdis, ŝi tiel ektimis, ke la tuta sango fluis al la koro. Ŝi komprenis, ke Neĝulino reviviĝis. „Nun mi preparos ion pli bonan, por neniigi vin.” Ŝi sciis la sorĉarton kaj faris venenan kombilon. Ŝi alivestis sin kiel alia maljuna virino kaj iris trans la sep montojn al la sep malgrandeguloj, frapis la pordon kaj ekkriis: „Bona komercaĵo malkara, malkara!” Neĝulino ekrigardis kaj diris: „Daŭrigu la vojon, malpermesite estas al mi enlasi iun ajn.” „Sed vi ja povas rigardi,” diris la maljunu-

NEĜULINO

lino, eltiris la venenan kombilon kaj levis ĝin al la fenestro. Ĝi tiel plaĉis al la knabino, ke ŝi lasis sin trompi kaj malfermis la pordon. Kiam ili interkonsentis pri la prezo, la maljunulino diris: „Permesu, mi mem kombu vin.” La kompatinda Neĝulino senpripense permesis. Apenaŭ la sorĉistino enigis la kombilon en la harojn, la veneno komencis efiki kaj la knabino falis senkonscia. „Miraklo de l' beleco, jen via fino,” diris la malbona virino kaj foriris.

Feliĉe jam vesperiĝis kaj la malgrandeguloj revenis hejmen. Ekvidinte senvivan Neĝulinon sur la planko, ili tuj eksuspektis la reĝinon. Ili komencis serĉi kaj trovis la venenan kombilon. Apenaŭ ili eltiris ĝin, Neĝulino rekonsciiĝis kaj rakontis, kio okazis. Ili ree avertis ŝin, ke ŝi estu singarda kaj malfermu la pordon al neniŭ.

La reĝino ekstaris hejme antaŭ la spegulo kaj diris:

„Speguleto mia, speguleto hela,
Kiu en la lando estas la plej bela?”

Ĝi respondis kiel antaŭe:

„Vi estas plej bela ĉe ni, ho reĝino,
Sed trans montoj kaj rivero
Sur la de l' pigmeoj tero
Miloble pli bela estas Neĝulino.”

Aŭdinte la vortojn de l' spegulo, la reĝino ektremis pro kolero. „Neĝulino devas morti, eĉ se tio kostus al mi la vivon,” ekkriis ŝi, iris en kaŝitan ĉambron, kiun neniŭ vizitadis kaj faris tie venenan pomon. Ekstere ĝi estis bela, blanka kaj rozvanga; ekvidinte ĝin, ĉiu dezirus ĝin gustumi, sed plej malgranda ĝia peceto estis mortiga. Kiam la pomo estis preta, la reĝino alivestis sin kiel kamparanino kaj iris trans la sep montojn al la sep malgrandeguloj. Ŝi frapis la pordon. Neĝulino elrigardis tra la fenestro kaj diris: „Malpermesite estas al mi iun enlasi, la sep malgrandeguloj tiel ordonis.” „Bone,” respondis la kamparanino, „en ĉia okazo mi sukcesos vendi la pomojn. Jen, mi donacos

NEĜULINO

unu pomon al vi." „Ne," respondis Neĝulino, „mi povas nenion akcepti." „Ĉu vi timas venenon?" diris la maljunulino, „rigardu, mi distranĉos la pomon; la ruĝan vangon vi manĝos, la blankan mi." La pomo estis tiel artifice farita, ke nur la ruĝa parto estis venena. Neĝulino rigardis la belan pomon kaj vidante, ke la kamparanino manĝas, ne povis sin deteni, etendis la manon kaj prenis la venenan parton. Sed apenaŭ ŝi demordis peceton, ŝi falis senviva. La reĝino kruele rigardis ŝin, laŭte ridis kaj diris: „Blanka kiel la neĝo, ruĝa kiel la sango, nigra kiel la ebono! Nun ne vekos vin la malgrandeguloj." Kiam ŝi hejme demandis la spegulon:

„Speguleto mia, speguleto hela,
Kiu en la lando estas la plej bela?"

ŝi respondis fine:

„Vi reĝino, vi estas ĉe ni la plej bela."

Nur tiam ŝia enviema koro ĝuis trankvilon, se enviema koro povas ĝin ĝui.

La malgrandeguloj, reveninte vespere hejmen, trovis Neĝulinon kuŝanta sur la planko. Neniu spiro eliĝis el ŝia buŝo, ŝi estis senviva. Ili levis ŝin, serĉis ĉe ŝi ion venenan, mallaĉis ŝin, kombis ŝiajn harojn, lavis ilin en akvo kaj vino, sed vane. La amata infano estis kaj restis senviva. Ili metis ŝin en ĉerkon, ĉiuj sidiĝis apud ŝi kaj ploris ŝin, ploris dum tri tagoj. Ili volis entombigi ŝin, sed ŝi estis ankoraŭ freŝa, kiel vivanta homo, kaj ŝiaj vangoj estis ruĝaj, kiel antaŭe. Tiam ili diris: „Ni ne povas kovri ŝin per tero" kaj ili venigis vitran ĉerkon, en kiu oni povis vidi ŝin de ĉiuj flankoj, metis ŝin tien kaj skribis ŝian nomon per oraj literoj, kaj ke ŝi estis reĝidino. La ĉerkon ili metis sur monton kaj unu el ili ĉiam restis tie kaj gardis ĝin. Bestoj venis kaj ploris Neĝulinon, strigo, poste korvo, fine kolombo.

Neĝulino longe kuŝis en la ĉerko. Ŝi ne putris, ŝajnis, ke ŝi dormas, ĉar ŝi estis ankoraŭ blanka kiel la neĝo, ruĝa kiel la

NEĜULINO

sango, nigrahara kiel la ebono. Foje okazis, ke reĝido venis en la arbaron kaj eniris en la domon de l' malgrandeguloj por pasigi tie la nokton. Li vidis sur la monto la ĉerkon, la belan Neĝulinon en ĝi, kaj li legis la oran surskribon. Li diris al la malgrandeguloj: „Donu al mi la ĉerkon, vi ricevos de mi por ĝi ĉion, kion vi postulos.” Sed la malgrandeguloj respondis: „Ni ne donos ĝin por la tuta oro de l' mondo.” Tiam li diris: „Donacu ŝin al mi, ĉar mi ne povos vivi, ne vidante Neĝulinon. Mi ŝin estimos kaj



respektos, kiel ion plej karan.” Aŭdinte liajn vortojn, la malgrandeguloj ekkompatis lin kaj donacis al li la ĉerkon. La reĝido ordonis al la servistoj forporti ŝin sur la ŝultroj. Ili faletis paŝinte sur arbeton; de la skuo elfalis la venena peceto, kiun demordis Neĝulino, el ŝia gorĝo. Post momento ŝi malfermis la okulojn, levis la kovrilon de l' ĉerko, rekonsciigis kaj ree estis vivanta. „Mia Dio! kie mi estas?” ekkriis ŝi. „Vi estas ĉe mi,” respondis ĝoje la reĝa filo, „mi amas vin super ĉio en la mondo; iru kun mi en la kastelon de mia patro, vi estos mia edzino.” Neĝulino konsentis kaj iris kun li. La geedziĝa festo estis luksa kaj belega.

Oni invitis ankaŭ la sendian duonpatrinon de Neĝulino. Surmetinte belan tualeton, la reĝino stariĝis antaŭ la spegulo kaj demandis:


„Speguleto mia, speguleto hela,
Kiu en la lando estas la plej bela?”

NEĜULINO

La spegulo respondis:

„Plej bela vi estas ĉe ni, Sinjorino,
Sed miloble pli bela — la juna reĝino.

La malbona virino laŭte malbenis kaj tiel ektimis, ke ŝi ne povis trankviliĝi. Komence ŝi tute ne volis iri al la geedziĝo, sed ŝi ne povis resti, ŝi devis vidi la junan reĝinon. Kiam ŝi venis, ŝi rekonis Neĝulinon kaj pro timo kaj teruro ne povis moviĝi. Sur flamantaj karboj jam estis metitaj feraj pantofloj. Oni alportis ilin antaŭ la reĝinon kaj ŝi devis surmeti ilin kaj danci en la ruĝebrulantaj ŝuoj, ĝis ŝi falis senviva.





Lupo kaj sep kapridoj

Estis iam maljuna kaprino, kiu havis sep idojn kaj amis ilin, kiel ĉiu patrino amas siajn infanojn. Iam ŝi volis iri en la arbaron por alporti nutraĵon. Ŝi alvokis ĉiujn sep kaj diris: „Karaj infanoj, mi iras en la arbaron, gardu vin bone kontraŭ la lupo; ne enlasu ĝin, ĉar alie ĝi manĝos vin kun haŭto kaj haroj. La fripono ofte aliformigas sin, sed vi tuj rekonos ĝin per ĝiaj nigraj piedoj kaj ĝia raŭka voĉo.” La kapridoj diris: „Kara patrino, vi povas trankvile foriri, ni estos singardaj.” La patrino ekblekis kaj foriris.

Baldaŭ iu ekfrapis la pordon kaj ekkriis: „Malfermu, karaj infanoj, via panjo alportis ion por ĉiu.” Sed la kapridoj rekonis la lupon per la raŭka voĉo: „Ni ne malfermos,” ekkriis ili, „vi ne estas nia patrino, ŝi havas delikatan voĉon, kaj la via estas raŭka, vi estas la lupo!” La lupo iris en butikon kaj aĉetis grandan pecon da kreto. Ĝi manĝis ĝin kaj ĝia voĉo fariĝis delikata. Ĝi revenis, frapis la pordon kaj ekkriis: „Malfermu karaj infanoj, via patrino alportis ion por ĉiu.” Sed ĉar la lupo metis sian nigran piedon en la fenestron, la infanoj rekonis ĝin kaj diris: „Ni ne malfermos, nia patrino ne havas nigrajn piedojn, kiajn vi: vi estas la lupo.” La lupo kuris al bakisto kaj diris: „Mi dolorigis mian piedon, ŝmiru ĝin per pasto.” Kiam la bakisto faris tion, la lupo kuris al la muelisto kaj diris: „Ŝutu blankan farunon sur mian piedon.” La muelisto pensis: „Ĝi volas iun trompi” kaj rifuzis, sed la lupo diris: „Se vi ĝin ne faros, mi manĝos vin.” La muelisto ektimis kaj blankigis ĝian piedon. Tiaj estas la homoj!

LUPO KAJ SEP KAPRIDOJ

La fripono iris trian fojon al la pordo, frapis ĝin kaj diris: „Malfermu, infanoj, jen revenis via kara patrino kaj alportis al ĉiu ion el la arbaro.” La kapridoj ekkriis: „Antaŭe montru vian piedon, ni volas vidi, ĉu vi estas nia kara panjo.” La lupo metis la piedon en la fenestron. Kiam la kapridoj vidis, ke ĝi estas blanka, ili kredis ĉion, kion la lupo diris, kaj malfermis la pordon. Sed tiu, kiu eniris, estis la lupo. Ili ektimis kaj volis sin kaŝi. Unu saltis sub la tablon, dua en la liton, tria en la fornon, kvara en la kuirejon, kvina en la ŝrankon, sesa sub la lavujon, sepa en la keston de l' horloĝo. Sed la lupo trovis ĉiujn kaj sen longaj konsideroj englutis ĉiujn unu post la alia; li ne trovis nur la plej junan, kiu sin kaŝis en la keston de l' horloĝo. La lupo satmanĝis, foriris, kuŝiĝis sur verda herbaĵo sub arbo kaj ekdormis.

Baldaŭ la kaprino revenis el la arbaro. Kion ŝi ekvidis! La pordo estis larĝe malfermita, la lavujo dispecigita, la kusenoj kaj la kovrilo estis eltiritaj el la lito. Ŝi serĉis la infanojn, sed nenie trovis ilin. Ŝi vokis ilin unu post la alia per la nomo, sed neniu respondis. Fine, kiam ŝi vokis la plej junan, eksonis delikata voĉo: „Kara patrino, mi sidas en la horloĝo.” Ŝi eltiris ĝin kaj ĝi rakontis, ke la lupo venis kaj manĝis ĉiujn aliajn. Oni povas imagi, kiel ŝi ploris siajn malfeliĉajn infanojn.

Fine ŝi eliris kun sia ĉagreno el la domo, kaj la plej juna kaprino sekvis ŝin. Kiam ŝi venis sur la herbejon, tie kuŝis la lupo sub arbo kaj ronkis tiel, ke la branĉoj tremis. Ŝi rigardis ĝin de ĉiuj flankoj kaj vidis, ke io moviĝas kaj tremas en ĝia ventro. „Dio mia,” pensis ŝi, „ĉu miaj infanoj, kiujn ĝi englutis por vespermanĝo, vivas ankoraŭ?” La kaprideto devis kuri hejmen kaj alporti tondilon, kudrilon kaj fadenojn. Apenaŭ ŝi ektranĉis la ventregon de l' monstro, unu kaprido jam etendis la kapon eksteren, kaj kiam ŝi daŭrigis tranĉi, ĉiuj ses elsaltis unu post alia. Ĉiuj estis sendifektaj, ĉar la avida monstro englutis ilin vivantaj. Granda estis la ĝojo! Ili karesis la amatan patrinon kaj dancis, kiel la tajloro, kiu festas edziĝon. La kaprino diris: „Iru serĉi ŝtonojn, ni plenigos per ili la ventron de l' sendia besto,

LUPO KAJ SEP KAPRIDOJ

dum ĝi dormas.” La kapridoj rapide, rapide altrenis ŝtonojn kaj ŝovis ilin en la ventron de la lupo. La patrino senprokraste kun-
kudris ĝin; la lupo nenion sentis, eĉ ne moviĝis.

Kiam la fripono fine satdormis, ĝi leviĝis, kaj ĉar la ŝtonoj kaŭzis al ĝi grandan soifon, ĝi ekiris al la puto: la ŝtonoj ruliĝis kaj bruis en ĝia ventro. La lupo ekkriis:

„Oh, en ventro kia pezo,
Sentas ŝtonojn mi en mezo.
La kapridojn mi ja manĝis,
Kiu ilin tie ŝanĝis?”

Ĝi venis al la puto kaj kliniĝis al la akvo por trinki. La pezaj ŝtonoj entiris ĝin en la akvon kaj ĝi dronis. Kiam la sep kapridoj tion vidis, ili alkuris, kriante: „La lupo mortis! la lupo mortis” — kaj pro ĝojo dancis ĉirkaŭ la puto.





Reĝo rano aŭ fera Henriko

En la tempo jam de longe pasinta, kiam efikis ankoraŭ la sorĉado, vivis reĝo. Ĉiuj liaj filinoj estis belaj, sed la plej juna estis tiel bela, ke eĉ la suno, kiu ja vidis multon, miris, kiam ĝi rigardis ŝian vizagon. Proksime de la kastelo de l' reĝo staris granda, malluma arbaro, kaj en la arbaro sub maljuna tilio estis puto. Se la tago estis tre varmega, la reĝidino iris en la arbaron kaj sidiĝis sur la rando de l' malvarma puto, kaj se ŝi enuis, ŝi prenis oran globon, ĵetis supren kaj kaptis; tio estis ŝia plej amata ludo.

Foje la ora globo falis ne en la etenditan manon de l' reĝa filino, sed teren kaj ruliĝis rekte en la akvon. La knabino sekvis ĝin per la okuloj, sed la globo malaperis, kaj la puto estis tiel profunda, ke oni ne povis vidi la fundon. Ekploris la reĝidino, ploris pli kaj pli laŭte, sed ne povis konsoliĝi. Kiam ŝi tiel ĉagreniĝis, iu diris al ŝi: „Kio estas al vi, reĝa filino? Vi tiel krias, ke ŝtono ekkompatus vin.” La reĝidino ĉirkaŭrigardis, de kie venas la voĉo, fine ŝi ekvidis ranon, kies malbela kapo elstaris el la akvo. „Ah, ĝi estas vi, maljuna kotulo,” diris ŝi, „mi ploras mian oran globon, kiu falis en la akvon.” „Trankviliĝu kaj ne ploru,” respondis la rano, „mi ĝin trovos, sed kion mi ricevos, se mi redonos al vi la ludilon?” „Ĉion, kion vi deziras, kara rano,” diris ŝi, „miajn vestojn, perlojn kaj multekostajn ŝtonojn, eĉ la oran kronon, kiun mi portas.” La rano respondis: „Mi ne deziras viajn vestojn, perlojn, ŝtonojn multekostajn, nek vian

REĜO RANO AŬ FERA HENRIKO

oran kronon; sed se vi ekamos min kaj mi fariĝos via amikino kaj ludkunulo, se vi konsentos, ke mi sidu apud vi ĉe la tablo, manĝu el via ora telereto, trinku el via pokaletto kaj dormu en via lito: se vi tion promesos al mi, mi malleviĝos ĝis la fundo kaj alportos la globon." „Jes, jes," diris ŝi, „mi promesas al vi ĉion, kion vi volas, se vi nur reportos al mi la globon." Sed ŝi pensis: „Kion babilas la malsaĝa rano! Ĝi ja sidas en la akvo kun siaj egaluloj kaj kvakas, sed ĝi ne povas esti kunulo de l' homo."

La rano, ricevinte la promeson, subakviĝis kaj post momento elnaĝis kun la globo en la buŝo kaj jetis la ludilon sur la herbon. La reĝidino, ekvidinte la globon, ekĝojis, levis ĝin kaj forkuris. „Atendu, atendu," kriis la rano, „kunprenu min, mi ne povas kuri, kiel vi." Kion helpis al ĝi, ke ĝi kriis sian kvak kvak tiel laŭte, kiel ĝi povis! La reĝidino tute ne atentis, rapidis hejmen kaj baldaŭ forĝesis la mizeran ranon, kiu devis reveni en sian puton.

En la sekvinta tago, kiam la reĝa filino sidis kun ĉiuj korteganoj ĉe la tablo kaj manĝis el sia ora telereto, iu surrampis klak klak la marmoran ŝtuparon, kaj atinginte la supron, frapis la pordon kaj ekkriis: „Reĝidino plej juna, malfermu al mi!" Ŝi ekkuris por vidi, kiu estas ekstere; ŝi malfermis: jen sidas la rano. Ŝi rapide brufermis la pordon kaj time sidiĝis ree ĉe la tablo. La reĝo bone vidis, ke ŝia koro forte batas, kaj diris: „Infano mia, kion vi timas, ĉu post la pordo grandegulo staras kaj volas forkapti vin?" „Ne, ne," respondis ŝi, „ne grandegulo, sed abomeninda rano." „Kion ĝi volas de vi?" „Ah, kara patro, kiam mi hieraŭ sidis en la arbaro ĉe la puto kaj ludis, mia ora globo falis en la akvon, kaj ĉar mi ploris kaj larmis, la rano alportis ĝin al mi. Mi promesis, ke ĝi estos mia kunulo, ĉar ĝi nepre postulis tion. Mi tute ne pensis, ke ĝi povas veni el sia akvo. Nun ĝi estas post la pordo kaj volas eniri al mi." Dume oni ree ekfrapis kaj vokis:

REĜO RANO AŬ FERA HENRIKO

„Reĝidino juna,
Malfermu al mi!
Ĉu vi jam forgesis,
Kion hieraŭ, ĉe l' malvarma puto
Diris vi al mi?
Reĝidino juna
Malfermu al mi!”

La reĝo diris: „Vi devas plenumi la promeson; iru, malfermu al ĝi.” Ŝi iris kaj malfermis la pordon; la rano ensaltis kaj sekvis ŝiajn paŝojn ĝis ŝia seĝo. Tie ĝi haltis kaj diris: „Levu min sur vian seĝon.” La knabino ŝanĉeliĝis, ĝis fine la patro ordonis tion fari. Kiam la rano estis sur la seĝo, ĝi volis leviĝi sur la tablon, kaj kiam ĝi jam estis tie, ĝi diris: „Nun alŝovu al mi vian oran telereton, ni kune manĝos.” Ŝi faris tion, sed ĉiu povis vidi, ke nevolonte. La rano manĝis kun apetito, al ŝi preskaŭ ĉiu peco haltis en la gorgo. Fine ĝi diris: „Mi satmanĝis kaj estas laca, nun portu min en vian ĉambreton, preparu vian silkan liteton, ni kuŝiĝos por dormi.” La reĝidino ekploris; ŝi timis la malvarman ranon, kiun ŝi ne kuraĝis eĉ ektuŝi kaj kiu nun volis dormi en ŝia bela, pura lito. Sed la reĝo ekkoleris kaj diris: „Vi ne devas malestimi tiun, kiu helpis vin en malfeliĉo.” La reĝidino prenis la ranon per du fingroj, portis ĝin supren kaj metis en angulon. Sed kiam ŝi kuŝis en la lito, la rano alrampis kaj diris: „Mi estas laca, mi volas dormi kiel vi. Levu min, alie mi diros tion al via patro.” La reĝa filino ekkoleris, ŝi kaptis la ranon kaj jetis ĝin per ĉiuj fortoj al la muro: „Nun vi ĝuos ripozon, abomeninda rano.”


Sed kiam ĝi falis teren, ĝi ne estis plu rano, sed reĝido kun belaj, gajaj okuloj. Laŭ la volo de ŝia patro li fariĝis ŝia kunulo kaj edzo. Li rakontis al ŝi, ke malbona sorĉistino faris lin rano, ke ŝi sola povis savi lin kaj ke morgaŭ ili kune veturos en lian regionon. Poste ili ekdormis kaj en la sekvinta mateno la suno vekis ilin. Antaŭ la pordo jam staris kaleŝo, al kiu estis jungitaj ok blankaj ĉevaloj kun strutaj plumoj sur la kapo kaj en oraj

REĜO RANO AŬ FERA HENRIKO

katenoj. Malantaŭe staris la servisto de l' juna reĝo — la fidela Henriko. La fidela Henriko tiel ĉagreniĝis, kiam lian sinjoron oni sorĉis rano, ke li ĉirkaŭis sian koron per tri feraj ringegoj, por ke ĝi ne krevu pro doloro kaj malĝojo. Henriko helpis la paron sidiĝi en la kaleŝon; li mem stariĝis malantaŭe kaj ĝoje rigardis la savitan sinjoron. Post iom da tempo la reĝo ekaŭdis post si krakon, kvazaŭ io rompiĝis. Li rigardis posten:

„Veturilo nia krevas!“ —
„Trankviligi vin mi devas;
Falis ring' de mia koro,
Kiun premis la doloro,
Kiam vi en puto restis
Kaj vi tie rano estis.“

Ankoraŭ duan kaj trian fojon io ekkrakis dum la vojaĝo, kaj la reĝa filo pensis, ke la kaleŝo rompiĝis, sed tio estis la ringegoj, kiuj defalis de l' koro de fidela Henriko, ĉar lia sinjoro estis savita kaj feliĉa.





Estis antaŭ jaroj iu reĝo. Li havis post la palaco ĝardenon, kaj en ĝi arbon, kiu havis orajn pomojn. Kiam la pomoj maturiĝis, oni kalkulis ilin; sed tuj en la sekvinta tago unu mankis. Oni raportis pri tio al la reĝo, kaj li ordonis starigi ĉiunokte gardistojn sub la arbo. La reĝo havis tri filojn. La plej aĝan li sendis ĉe noktigo en la ĝardenon; sed noktomeze la dormo fermis al la junulo la okulojn, kaj matene ree mankis unu pomo. En la sekvinta nokto staris garde la dua filo, sed li ne pli bone sukcesis: kiam sonoris la dekdua horo, li ekdormis, kaj matene mankis unu pomo. Venis la vico de l' tria filo, sed la patro ne konfidis al li kaj pensis, ke li estos ankoraŭ malpli sukcesa ol la fratoj; tamen fine li donis sian permeson. La junulo ekkusis sub la arbo kaj zorge forpeladis de si la dormon. Kiam sonoris la dekdua horo, io ekbruis en la aero; en la lumo de la luno li ekvidis flugantan birdon, kies plumaro ora brile radiis. La birdo malleviĝis sur la arbon kaj ĝuste deŝiris unu pomon, kiam la knabo sendis sagon en ĝin. La birdo forflugis, sed la sago trafis la plumaron, kaj ora plumo falis teren. La junulo levis ĝin, alportis ĝin matene al la reĝo kaj rakontis, kion li vidis nokte. La reĝo kunvokis la konsilistaron, kaj ĉiu certigis, ke tia plumo valoras pli multe ol tuta regno. „Se la plumo estas tiel multekosta, unu estas por mi nenio, mi devas havi la tutan birdon.”

La plej aĝa filo ekiris serĉi la oran birdon. Li fidis al sia saĝo kaj estis certa, ke li trovos ĝin. Post iom da tempo li ekvidis vulpon, kiu sidis apud arbaro. La reĝido levis la pafilon kaj

ORA BIRDO

ekcelis. „Ne pafu!” ekkriis la vulpo, „mi donos al vi por tio bonan konsilon. Vi serĉas la oran birdon kaj hodiaŭ vespere vi venos en kamparon, kie du gastejoj staras unu kontraŭ la alia. Unu estas hele lumigita kaj gaje estas en ĝi: ne eniru tien, iru en la alian, kvankam ĝi ne plaĉos al vi.” „Ĉu povas doni prudentan konsilon tiel malsaĝa besto!” pensis la reĝa filo kaj pafis, sed maltrafis la vulpon, kiu etendis la voston kaj forkuris en la arbaron. La junulo ekiris antaŭen kaj venis vespere en la kamparon, kie staris ambaŭ gastejoj: en unu oni kantis kaj dancis, la alia estis malgaja kaj malĝoja. „Mi estus malsaĝulo,” pensis la reĝido, „se mi irus en la mizeran gastejon kaj preterpasus la belan.” Li eniris en la gajan domon, vivis tie lukse kaj gaje kaj forgesis la birdon, patron kaj ĉiujn bonajn konsilojn.

Kiam pasis iom da tempo kaj la plej aĝa filo ne revenis hejmen, la dua ekiris serĉi la oran birdon. Same kiel la plej aĝa li renkontis la vulpon kaj ne obeis ĝian bonan konsilon. Li venis al la du gastejoj. En unu, kie sonis gajeco, ĉe la fenestro staris lia frato. Li ne povis kontraŭstari la allogon, eniris kaj vivis tie, zorgante nur pri sia plezuro.

Ree pasis iom da tempo. La plej juna reĝido volis sekvi la fratojn kaj serĉi fortunon, sed la patro ne permesis: „Vane li irus; certe li ne trovos la oran birdon, se la pli aĝaj ne sukcesis. Se io malfeliĉa okazos al li, li ne scios kion fari. Saĝo mankas al li.” Sed fine, kiam la knabo ne lasis lin trankvila, la reĝo permesis al li iri. Apud la arbaro ree sidis la vulpo, kiu petis kompaton kaj donis la bonan konsilon. La junulo estis bonkora kaj diris: „Trankviliĝu, vulpeto, mi ne turmentos vin.” „Vi tion ne bedaŭros,” respondis la vulpo. „Sidiĝu sur mian voston, vi rapide forveturos.” Apenaŭ la reĝido sidiĝis, la vulpo ekkuris galope trans ŝtonojn kaj akvojn, — la haroj fajfis en la vento. Kiam ili venis en la kamparon, la reĝido desaltis, sensanceliĝe eniris en la mizeran gastejon kaj trankvile pasigis tie la nokton. En la sekvinta tago, kiam li venis en la kampon, la vulpo jam sidis tie kaj diris: „Mi diros al vi, kion vi devas nun fari. Iru

ORA BIRDO

rekte antaŭen, ĝis vi venos al kastelo, antaŭ kiu vi vidos tutan taĉmenton da soldatoj. Ne timu ilin, ĉar ili ĉiuj dormos kaj ronkos. Iru inter ili rekte en la kastelon; pasinte tra ĉiuj ĉambroj vi venos en kameron, kie ora birdo sidas en ligna kaĝo. Apude vi trovos malplenan kaĝon por pompo, sed gardu vin elpreni la birdon el la malbela kaĝo kaj meti en la luksan, alie ve al vi!" Post tiuj ĉi vortoj la vulpo ree etendis la voston, kaj la reĝa filo sidiĝis sur ĝin: galop, galop trans ŝtonojn kaj akvojn, — la haroj fajfis en la vento. Kiam li atingis la kastelon, li trovis ĉion tiel, kiel rakontis la vulpo. La reĝa filo venis en kameron, kie la ora birdo sidis en ligna kaĝo, kaj apude estis ora kaĝo; la tri oraj pomoj kuŝis sur la planko. La junulo pensis, ke ridinde estus lasi la belan birdon en la malbela kaĝo, malfermis la pordon, prenis la birdon kaj metis en la oran. En la sama momento eksonis terura krio de l'birdo. La soldatoj vekiĝis, sin ĵetis al la reĝido kaj forkondukis lin en malliberejon. En la sekvinta tago li estis juĝata: li konfesis ĉion kaj estis kondamnata al morto. La reĝo diris, ke li donacos al li la vivon, se li alkondukos la oran ĉevalon, kiu kuras pli rapide ol la vento. Se li sukcesos, li ricevos rekompence ankaŭ la oran birdon.

La reĝido ekiris, sed li estis malĝoja, ĉar kie trovi la oran ĉevalon? Subite li ekvidis la malnovan amikon — la vulpon, kiu sidis ĉe la vojo. „Vi vidas," diris la vulpo, „kio okazis, ĉar vi ne obeis mian konsilon. Sed ne ĉagreniĝu, mi helpos vin kaj diros, kiamaniere vi povos akiri la oran ĉevalon. Iru rekte antaŭen, vi venos al kastelo, kie la ĉevalo staras en stalo. Antaŭ la stalo kuŝos la servistoj, sed ili dormos kaj ronkos kaj vi povas trankvile elkonduki la ĉevalon. Sed memoru jenon: surmetu sur ĝin la eluzitan selon el ligno kaj ledo, ne la oran apude pendantan, alie ve al vi!" Dirinte ĉi tion, la vulpo etendis la voston kaj la reĝa filo sidiĝis sur ĝin: galop, galop trans ŝtonojn kaj akvojn, — la haroj fajfis en la vento. Ĉio okazis tiel, kiel rakontis la vulpo. Li venis en la stalon, kie la ora ĉevalo staris; sed kiam li estis metonta sur ĝin la eluzitan selon, li ekpensis: „Mi ofendos la

ORA BIRDO

belan beston, se mi ne metos sur ĝin la oran selon, kvazaŭ kreitan por ĝi." Sed apenaŭ la ora selo ektuŝis la ĉevalon, la besto laŭte eklekis. La servistoj vekiĝis, kaptis la junulon kaj ĵetis lin en malliberejon. En la sekvinta tago la juĝo kondamnis lin al morto, sed la reĝo promesis donaci al li la vivon kaj aldone la oran ĉevalon, se li forrabos la reĝidinon el la ora kastelo.


Kun peza koro ekiris la junulo, sed feliĉe li baldaŭ renkontis la fidelan vulpon. „Mi devus forlasi vin en via malfeliĉo,” diris la vulpo, „sed mi kompatas vin kaj ankoraŭ unu fojon mi vin savos. La vojo kondukos vin rekte al la ora kastelo. Vespere vi venos tien, kaj nokte, kiam ĉio eksilentos, la reĝidino iros en bandomon. Kiam ŝi eniros, saltu al ŝi kaj ŝin kisu: ŝi sekvos vin kaj vi povos ŝin forkonduki. Sed ne permesu al ŝi adiaŭi la gepatrojn, alie ve al vi!” La vulpo etendis la voston kaj la reĝa filo sidiĝis sur ĝin: galop, galop trans ŝtonojn kaj akvojn, — la haroj fajfis en la vento. Li venis al la ora kastelo kaj ĉio okazis, kiel diris la vulpo. Li atendis ĝis la noktomezo kaj kiam ĉiujn jam lulis la dormo kaj la reĝidino iris en la bandomon, li saltis al ŝi kaj ŝin kisis. Ŝi diris, ke ŝi volonte iros kun li, sed petegis lin kun larmoj en la okuloj, ke li permesu al ŝi adiaŭi la gepatrojn. Komence li kontraŭstaris al ŝiaj petoj, sed fine, kiam ŝi ploris pli kaj pli plende kaj falis al liaj piedoj, li konsentis. Apenaŭ ŝi alpaŝis al la lito de l' patro, li vekiĝis kaj kun li la tuta kastelo. Oni kaptis la junulon kaj ĵetis en malliberejon.

En la sekvinta tago la reĝo diris: „Vi perdos la vivon, se vi ne forigos la monton, kiu kuŝas antaŭ miaj fenestroj kaj trans kiu mi ne povas vidi la landon. En la daŭro de ok tagoj la laboro devas esti farata. Se vi sukcesos, vi rekompence ricevos mian filinon.” La reĝido dum sep tagoj fosis kaj ŝovelis seninterrompe, sed post sep tagoj li vidis, ke la rezultato estas nula; li malĝojis kaj malesperis. La sepan vesperon aperis la vulpo kaj diris: „Vi ne meritas mian helpadon, tamen iru kaj kuŝiĝu, mi faros vian laboron.” En la sekvinta mateno, kiam li vekiĝis kaj ekrigardis tra fenestro, li ne vidis plu la monton. Li ĝojplena rapidis al la

ORA BIRDO

reĝo kaj raportis al li, ke la kondiĉo estas plenumita. Vole nevole la reĝo devis efektiviĝi la promeson kaj doni al li la reĝidino.

Nun ili ambaŭ ekiris kaj baldaŭ renkontis la vulpon. „La plej bonan parton vi jam havas,” diris li, „sed al la reĝidino el la ora kastelo mankas ankoraŭ la ora ĉevalo.” „Kiamaniere akiri ĝin?” demandis la junulo. „Mi tuj diros al vi,” respondis la vulpo.



„Antaŭ ĉio konduku la reĝidino al la reĝo, kiu sendis vin en la oran kastelon. Granda ĝojo ekregos tie, oni volonte donos al vi la oran ĉevalon. Kiam oni ĝin alkondukos, tuj saltu sur ĝin kaj etendu al ĉiuj manoj por adiaŭo, laste al la reĝidino. Kiam vi tenos ŝian manon, surtiru ŝin rapide sur la selon kaj forgalopu. Neniu kaptos vin, ĉar la ĉevalo kuros pli rapide ol la vento.”

Ĉio estis sukcese plenumata kaj la reĝa filo forrabis sur la ora ĉevalo la belan reĝidino. Baldaŭ li renkontis la vulpon, kiu diris al la junulo: „Nun mi helpos vin akiri la oran birdon. Kiam vi estos proksime de l' kastelo, kie estas la ora birdo, igu la reĝidino malsupreniri de l' ĉevalo, mi ŝin gardos. Poste rajdu sur la ora ĉevalo en la kastelan korton. Ĉiuj ekĝojos, vidante vin, kaj oni alportos al vi la oran birdon. Kiam vi havos la kaĝon en la manoj, tuj galopu ree al ni kaj prenu la reĝidino.” Ĉio bone sukcesis, kaj kiam la reĝido estis revenonta hejmen kun siaj trezoroj, la vulpo diris: „Nun vi devas rekompenci mian helpon.” „Kion vi postulas?” demandis la junulo. „Kiam ni venos tien en la arbaron, mortpafu min kaj detranĉu miajn piedojn kaj kapon.” „Tio estus bela dankemo,” diris la reĝa filo, „mi faros ĝin por nenio en la mondo.” La vulpo diris: „Se vi ne volas

ORA BIRDO

tion fari, mi devas forlasi vin, sed antaŭ la foriro, mi donos al vi bonan konsilon. Gardu vin kontraŭ du aferoj: ne aĉetu viandon de l' pendigilo, ne sidiĝu sur la randon de l' puto." La junulo pensis: „Stranga besto kun strangaj kapricoj! Kiu aĉetus viandon de l' pendigilo! Mi neniam sentis inklinon sidiĝi sur la randon de l' puto." Li rajdis antaŭen kun la bela reĝidino, kaj la vojo kondukis lin tra la kamparo, kie restis ambaŭ liaj fratoj. Granda popolamaso nun kriis tie, unuj puŝis la aliajn. Kiam li demandis, kio okazas, oni respondis, ke du homoj estos pendigataj. Li proksimiĝis kaj rekonis siajn fratojn, kies konscienco estis ŝarĝita per multaj kulpoj kaj kiuj perdis tutan sian havon. Li demandis, ĉu li povus ilin liberigi. „Se vi pagus por ili," oni respondis, „sed por kio perdi monon por tiaj friponoj!" Sen longaj konsideroj la reĝido pagis por ili kaj ĉiuj kune ili forveturis.


Ili venis en la arbaron, en kiu ili iam renkontis la vulpon. Agrable estis tie kaj malvarmete; la fratoj do diris: „Ni ripozu iom ĉe la puto, ni trinku kaj manĝu!" Li konsentis kaj dum la interparolado li forgesis la averton, sidiĝis sur la randon, ne suspektante perfidon. La fratoj enpuŝis lin en la puton, prenis la reĝidino, ĉevalon kaj birdon kaj ekiris hejmen. „Jen ni akiris ne nur la oran birdon," diris ili, „sed ankaŭ la oran ĉevalon kaj la virgulinon el la ora kastelo." Granda estis la ĝojo, sed la ĉevalo ne volis manĝi, la birdo ne fajfis, kaj la knabino sidis kaj ploris.

La plej juna filo ne pereis en la puto. Ĝi estis feliĉe senakva kaj li falis sendifekta sur molan muskon, sed ne povis eliĝi. Ankaŭ en ĉi tiu malfeliĉo la fidela vulpo ne forlasis lin. Ĝi alkuris kaj riproĉis la reĝidon, ke li forgesis ĝian konsilon. „Mi ne povas forlasi vin," diris ĝi, „mi eltiros vin al la taga lumo." Ĝi diris al la reĝa filo, ke li ekkaptu ĝian voston kaj forte ĝin tenu, kaj ĝi eltiris la junulon supren. „Vi ne estas ankoraŭ sendanĝera," diris la vulpo, „viaj fratoj ne estas certaj, ĉu vi mortis; ili ĉirkaŭis la arbaron per gardistoj kun ordono mortigi vin, se

ORA BIRDO

vi revenos." Malriĉulo sidis ĉe vojo, la junulo intersanĝis kun li la vestojn kaj tiamaniere sukcesis eniri en la kastelon. Neniu lin rekonis, sed la birdo komencis fajfi, la ĉevalo komencis manĝi kaj la reĝidino ĉesis plori. La reĝo ekmiris kaj demandis: „Kion tio signifas?" La reĝidino respondis: „Mi ne scias, sed estis tiel malĝoje al mi, kaj nun mi estas tiel gaja! Ŝajnas al mi, ke venis mia vera fianĉo." Ŝi rakontis ĉion, kio okazis, kvankam la du fratoj estis minacintaj mortigi ŝin, se ŝi malkaŝos ilian perfidon. La reĝo kunvokis ĉiujn, kiuj estis en la kastelo; venis ankaŭ la junulo, kiel malriĉulo en ĉifonoj, sed la reĝidino tuj rekonis lin kaj saltis al lia brusto. La sendiaj fratoj estis kaptataj kaj kondamnataj al la morto, kaj la plej juna reĝido edziĝis kun la bela virgulino kaj estis proklamata heredonto de l' reĝo.

Kaj la malfeliĉa vulpo? Longe, longe post ĉi tiuj okazoj la reĝido foje iris en la arbaron kaj renkontis la vulpon, kiu diris: „Vi posedas nun ĉion, kion vi deziris, sed mia malfeliĉo ne havas finon; sed se vi volos, vi povos min savi." Kaj ĝi ree petegis, ke li mortpafu ĝin kaj detranĉu ĝiajn piedojn kaj kapon. Apenaŭ la reĝa filo tion faris, la vulpo fariĝis homo. Li estis neniu alia, ol la frato de la bela reĝidino. Kiam la kruela sorĉo estis forigita, nenio mankis en ilia feliĉo ĝis la morto.



Feliĉa Joĉjo



Joĉjo, servinte sep jarojn ĉe sia sinjoro, diris: „Sinjoro, mi volus reveni al mia patrino, sufiĉe jam mi servis ĉe vi, donu al mi mian salajron.” La sinjoro respondis: „Vi servis al mi fidele kaj honeste. Kia ago, tia pago” kaj donis al li pecon da oro tiel grandan, kiel lia kapo. Joĉjo eltiris el la poŝo tukon, envolvis la oron, metis ĝin sur la ŝultrojn kaj ekiris hejmen. Kiam li iris sur la vojo kaj ĉiam metis unu piedon antaŭ la alia, li ekvidis rajdanton freŝan kaj gajan sur vigla ĉevalo. „Ah, bona afero estas la rajdado,” diris Joĉjo tute laŭte. „Oni sidas kvazaŭ sur seĝo, ne faletas sur ŝtono, indulgas la ŝuojn kaj senpene vojaĝas.” La rajdanto, aŭdinte tion, haltis kaj ekkriis: „Kial vi piediras, Joĉjo?” „Mi estas devigata. Jen mi portas pecon hejmen: ĝi estas oro, ĝi premeblas miajn ŝultrojn kaj mi ne povas levi la kapon.” „Ĉu vi scias?” diris la rajdanto, „ni intersanĝu: mi donos al vi mian ĉevalon, kaj vi donu al mi la pecon.” „Tre volonte,” diris Joĉjo, „sed mi avertas vin, ke vi treniĝos kun la ŝarĝo.” La rajdanto desaltis de l' ĉevalo, prenis la oron, helpis Joĉjon sidiĝi, donis al li la kondukilojn en la manojn kaj diris: „Se vi volos rajdi rapide, klaku per la lango kaj krii hop hop!”

Joĉjo estis tre fierza, ke li sidas sur la ĉevalo kaj rajdas kvazaŭ sinjoro. Post momento li ekpensis, ke li povas rajdi pli rapide. Li ekklakis per la lango kaj kriis hop hop! La ĉevalo ektritis rapide, post kelkaj saltoj deĵetis sian rajdanton en foston, kiu apartigis la kampon de la vojo. La ĉevalo estus forkurinta, sed feliĉe kaptis ĝin kamparano, kiu sur la sama vojo kondukis


FELIĈA JOĈJO

bovinon. Joĉjo pene levis de l' tero siajn dolorajn membrojn kaj stariĝis ree sur la piedoj. Li estis kolera kaj ekkriis: „Malsaĝa afero estas la rajdado, precipe kiam oni havas tian ĉevalaĉon, kia ĉi tiu, kiu deĵetas vin, pro kio oni povas rompi la kolon; neniam plu mi sidiĝos sur ĉevalon. Alia afero estas la bovino. Oni trankvile iras post ŝi kaj havas ĉiutage lakton, buteron kaj fromaĝon. Kiom mi donus por havi tian bovinon.” „Se tio tiel plaĉas al vi,” diris la kamparano, „mi volonte prenos intersanĝe la ĉevalon por la bovino.” Joĉjo konsentis kun ĝojo. La kamparano saltis sur la ĉevalon kaj forrajdis.

Joĉjo trankvile pelis la bovinon antaŭ si kaj ĝojis pro la feliĉa intersanĝo. „Se mi havos nur pecon da pano, kaj ĝi ne mankos ja al mi, mi povos ĉiam, kiam mi deziros, manĝi ĝin kun butero kaj fromaĝo; kiam mi soifos, mi melkos mian bovinon kaj trinkos lakton. Kion plu, mia Joĉjo, vi deziras?” Veninte al drinkejo, li haltis, manĝis ĉiujn provizojn, kiujn li havis por tag- kaj vespermanĝo kaj plena de ĝojo trinkis duonglason da biero por la lastaj heleroj. Poste li ekpelis la bovinon al la kamparo, kie loĝis lia patrino. Ju pli proksimiĝis la tagmezo, des pli forte bruligis la suno. Unu mejlon ankoraŭ la loko estis dezerta. Estis tiel varmege, ke la lango de Joĉjo algluiĝis pro soifo al la palato. „Mi havas kontraŭ tio rimedon” pensis Joĉjo „mi melkos la bovinon kaj ĝuos la freŝan lakton.” Li ligis ŝin al seka arbo kaj ne havante vazon submetis sian ĉapon kaj komencis melki. Vanaj estis ĉiuj liaj penoj, ne aperis eĉ unu guto da lakto! Li tiel mallerte atakis la mametojn, ke fine la malpacienca besto piedbatis lian kapon. Joĉjo falis senkonscia. Feliĉe post momento venis buĉisto, kiu veturigis junan porkon en puŝveturilo. „Kio okazis?” diris li kaj helpis la bonan Joĉjon leviĝi. Joĉjo rakontis la tutan aventuron. La buĉisto donis al li sian botelon kaj diris: „Refreŝigu vin. La bovino ne donados lakton, ŝi estas maljuna bruto, ŝi povas taŭgi nur kiel tirbesto aŭ en buĉejo.” „Kiu povus tion supozi,” murmuris Joĉjo, glatigante la harojn sur sia kapo. „Bone estas, kiam oni povas buĉi hejme tian bruton, oni havas

FELIÇA JOĈJO

viandon. Sed mi ne tre amas bovaĵon, ĝi ne estas sufiĉe suka. Tia juna porko estas alia afero! Bonega manĝaĵo, kaj krom tio



la kolbasoj.” „Aŭskultu, Joĉjo,” diris la buĉisto, „se tio faros plezuron al vi, mi donos interŝanĝe la porkon por via bovino.” „Dio rekompencu vian bonan koron” diris Joĉjo, donis al li la bovinon kaj prenis de l’ puŝveturilo la porkon, liginte ĝin per ŝnuro.

Joĉjo daŭrigis la vojon kaj pensis, kiel ĉio fariĝas laŭ lia volo; se io malagrabla okazis, tuj ĝi estis forigata. Post iom da tempo al li aliĝis junulo, kiu portis belan, blankan anseron sub la brako. Ili interparolis, kaj Joĉjo rakontis pri sia feliĉo kaj siaj profitaj interŝanĝoj. La knabo diris, ke li portas la anseron al baptofesto. „Levu ĝin,” daŭrigis li kaj prenis la anseron per la flugiloj, „kiel peza ĝi estas, oni ĝin grasigis ok semajnojn. Kiu manĝos la rostaĵon, al tiu la graso fluos sur la mentono.” „Jes,” diris Joĉjo, pesante la birdon per la mano, „ĝi estas peza, sed ankaŭ mia porko estas bela ekzemplero.”

Dume la junulo ĉirkaŭrigardis suspekte, balancis la kapon kaj fine diris: „Aŭskultu, ne tute klara estas la afero kun via porko. En la kamparo, tra kiu mi ĵus pasis, oni ŝtelis porkon al la estro. Mi timas, mi timas, ke ĝi estas nun en via posedo. Homoj diskuris por serĉi la ŝtelinton. Kia skandalo, se ili trovos vin kun la porko: malluma kavo atendas vin.” Ektimis la bona Joĉjo.

FELIĈA JOĈJO

„Ho Dio,” diris li, „savu min, amiko; vi konas la ĉirkaŭaĵon, prenu mian porkon kaj lasu al mi vian anseron.” „Mi iom riskas,” respondis la junulo, „sed mi ne volas esti kulpa pri via malfeliĉo.” Li prenis la ŝnuron en la manon kaj ekpelis rapide la porkon sur flankan voĵeton; la bona Joĉjo trankviliĝinte iris hejmen kun la ansero sub la brako. „Bone pripensinte,” diris li al si mem, „mi vidas, ke mi gajnis per la interŝanĝo: unue mi havos la bonan rostaĵon, poste multon da graso, kiu elgutos kaj sufiĉos por pano dum kvaronjaro, fine la belajn blankajn plumojn, per kiuj mi rembuos kusenon. Komforta estos la dormado! Kiel ĝojos la patrino.”

Li preterpasis la lastan kamparon. Tie li renkontis akrigiston, kiu kantis turnante sian ilon:


Akrigas bonege mi ĉiun tranĉilon,
Rapide, rapide mi turnas la ilon!

Joĉjo haltis kaj rigardis la laboron; fine li ekparolis: „Gaje vi laboras, profita do estas via metio?” „Jes, ĝi donas orajn enspezojn. Bona akrigisto, ĉiufoje kiam li metas manon en la poŝon, trovas tie monon. Sed kie vi aĉetis la belan anseron?” „Mi ĝin ne aĉetis, mi ricevis ĝin interŝanĝe por mia porko.” „Kaj la porkon?” „Mi prenis ĝin por bovino.” „Kaj la bovinon?” „Mi ricevis por ĉevalo.” „Kaj la ĉevalon?” „Por ĝi mi donis pecon da oro tiel grandan, kiel mia kapo.” „Kaj la oro?” „Ĝi estis salajro por sepjara servado.” „Por ĉio vi ĉiam trovis rimedon,” diris la akrigisto. „Se ĉiumatene, kiam vi leviĝas, mono sonus en via poŝo, la feliĉo estus via.” „Kiel tion fari?” diris Joĉjo. „Vi devas fariĝi akrigisto, kiel mi; oni bezonas por tio nur ŝtonan akrigilon, ĉio cetera troviĝos per si mem. Jen estas tia ilo, ĝi estas iom difektita, sed mi postulas por ĝi nur vian anseron! Ĉu vi konsentas?” „Kiel vi povas demandi,” respondis Joĉjo, „mi ja estos la plej feliĉa homo sur la tero; se mi havos monon ĉiufoje, kiam mi metas manon en la poŝon, kion mi bezonos plu?” Li donis la anseron al la akrigisto kaj ricevis la akrigilon.

FELIĈA JOĈJO

„Nu,” diris la ruzulo kaj levis ordinaran ŝtonon, kuŝantan apud li, „jen prenu ankaŭ ĉi tiun bonan ŝtonon, sur kiu vi povos bone forĝi, vi rektigos sur ĝi kurbajn najlojn. Prenu ĝin kaj gardu bone.”

Joĉjo prenis la ŝtonojn kaj iris kun ĝoja koro; liaj okuloj brilis pro kontenteco. „Mi naskiĝis sub bona stelo,” diris li, „ĉio prosperas al mi.” Li eksentis laciĝon, ĉar li estis sur la piedoj de l' frua mateno; ankaŭ la malsato turmentis lin, ĉar pro ĝojo li konsumis la tutan provizon, kiam li ricevis la bovinon por la ĉevalo. Fine li nur pene paŝis kaj ĉiumomente haltis. La ŝtonoj terure premegis lin. Li ne povis forpeli la penson, kiel bone estus, se li ne bezonus porti ilin. Kiel limako li alrampis al puto por ripozi tie kaj sin refreŝigi per freŝa akvo. Li singarde metis la ŝtonojn sur la rando kaj kliniĝis al la akvo por trinki. Malatente li tuŝegis ilin kaj la ŝtonoj plaŭd plaŭd falis en la puton. Joĉjo, vidinte tion, eksaltis pro ĝojo, ekgenuis kaj kun larmoj en la okuloj dankis Dion por la favoro, per kiu Li liberigis lin de la lasta ŝarĝo. Li ne bezonis riproĉi sin mem kaj ekkriis: „Tiel feliĉa homo, kiel mi, ne ekzistas sub la suno.” Kun libera koro kaj sen iu ŝarĝo li iris hejmen kaj venis al la patrino kun malplenaj manoj.





Joĉjo kaj Margenjo

Apud granda arbaro vivis malriĉa lignohakisto kun sia edzino kaj siaj du infanoj; la knabeto estis nomata Joĉjo, la knabino Margenjo. La lignohakisto havis ne multon por dividi kaj manĝi, kaj foje, kiam en la lando ekregis granda kareco, eĉ la ĉiutaga pano ekmankis al li. Kiam li vespere meditis pri tio kaj pro ĉagreno sin turnadis sur la lito, li ekĝemis kaj diris al sia edzino: „Kion ni faros? Kiamaniere ni nutros la infanojn, se ni mem havas nenion?” „Ĉu vi scias,” diris la edzino, „ni kondukas morgaŭ frumatene la infanojn en la arbaron en plej densan lokon. Ni ekbruligos fajron por ili, donos al ĉiu pecon da pano, lasos ilin solaj kaj revenos al nia laboro. Ili ne trovos la vojon hejmen kaj ni liberigos nin de ili.” „Ne,” diris la edzo, „tion mi ne faros. Mia koro ne permesus al mi lasi la infanojn solaj en la arbaro; sovaĝaj bestoj tuj alkurus kaj disŝirus ilin.” „Malsaĝulo,” diris la edzino, „alie ni ĉiuj kvar mortos pro malsato, vi jam povas raboti tabulojn por la ĉerkoj.” Ŝi tiel turmentis lin, ke fine li konsentis. „Domaĝo, kia domaĝo, la malfeliĉaj infanoj . . .” diris la lignohakisto.

Ankaŭ la infanoj ne povis ekdormi pro malsato kaj aŭdis, kion la duonpatrino diris al la patro. Margenjo ploris maldolĉajn larmojn kaj diris al Joĉjo: „Venis nia fino.” „Trankviliĝu Margenjo,” respondis Joĉjo, „ne malesperu, ni trovos rimedon.” Kiam la maljunuloj ekdormis, li leviĝis, sin vestis, malfermis la pordeton kaj ŝteliris eksteren. Hele lumis la luno, kaj la blankaj

JOĈJO KAJ MARGENJO

silikoj, kiuj kuŝis antaŭ la domo, brilis kiel dukatoj. Joĉjo kliniĝis kaj kolektis tiom da ili, kiom povis enpreni lia poŝo. Poste li revenis en la ĉambron kaj diris al Margenjo: „Timu nenion, kara fratineto, kaj dormu trankvile. Dio ne forlasos nin.” Li ree kuŝiĝis kaj ekdormis.

Kiam tagiĝis, ankoraŭ antaŭ la leviĝo de l' suno, la duonpatrino vekis la infanojn: „Leviĝu, maldiligentuloj, ni iros en la arbaron por alporti lignon.” Ŝi donis al ĉiu peceton da pano: „Jen por la tagmanĝo, sed ne manĝu pli frue, ĉar vi ricevos neniom plu.” Margenjo prenis la panon sub la antaŭtukon, ĉar Joĉjo havis la ŝtonojn en la poŝo. Ĉiuj ekiris en la arbaron. Kiam ili momenton iris, Joĉjo haltis, rigardis posten al la domo kaj poste senĉese sin turnis tien. La patro diris: „Joĉjo, kial vi tien rigardas kaj restas malantaŭe? Ĉesigu kaj ne forgesu pri viaj piedoj.” „Paĉjo, mi rigardas mian blankan kateton, ĝi sidas sur la tegmento kaj volas diri al mi adiaŭ.” „Malsaĝulo,” diris la duonpatrino, „tio ne estas via kateto, tio estas la matena suno, kiu lumigas la kamentubon.” Sed Joĉjo ne adiaŭis la kateton, li ĵetis la blankajn silikojn ĉiam po unu sur la vojon.

Kiam ili venis en la mezon de l' arbaro, la patro diris: „Kolektu lignon, infanoj, mi ekbruligos fajron, estas malvarmege.” Joĉjo kaj Margenjo alportis vergaĵon, tutan monteton da ĝi. Oni ekbruligis ĝin, kaj kiam la flamoj alte brulis, la duonpatrino diris: „Kuŝiĝu, infanoj, apud la fajro kaj ripozu. Ni iros en la arbaron haki. Kiam ni finos la laboron, ni revenos kaj kunprenos vin.”

Joĉjo kaj Margenjo sidis apud la fajro kaj tagmeze manĝis ĉiu sian pecon da pano. La infanoj pensis, ke la patro estas proksime, ĉar ili aŭdis la batojn de l' hakilo. Sed tio ne estis hakilo, ĝi estis branĉo, kiun li alligis al seka arbo kaj kiun la vento ĵetadis en ĉiujn flankojn. Ili tiel sidis longe, fine iliaj okuloj fermiĝis pro laciĝo kaj ili ekdormis. Kiam ili vekigis, estis jam malluma nokto. Margenjo komencis plori kaj diris: „Kiel ni eliros el la arbaro!” Joĉjo konsolis ŝin: „Atendu momenton, la luno leviĝos

JOĈJO KAJ MARGENJO

kaj ni trovos la vojon." Kiam leviĝis la plena luno, Joĉjo prenis Margenjon per la mano kaj iris serĉante la silikojn, kiuj brilis kiel novaj arĝentaj moneroj kaj montris al ili la vojon. Ili iris la tutan nokton kaj ĉe tagiĝo venis al la patra domo. Ili frapis la pordon kaj kiam la duonpatrino ilin vidis, ŝi diris: „Malbonaj infanoj, kial vi tiel longe dormis en la arbaro. Ni pensis, ke vi tute ne revenos". Sed la patro ĝojis, ĉar la konscienco riproĉis lin, ke li lasis ilin solaj.

Post nemulte da tempo la mizero revenis en la domon kaj la infanoj nokte aŭdis, kiel la patrino parolas en la lito al la patro: „Ĉio jam estas konsumita, ni havas ankoraŭ duonon da panbulo, kaj poste finita estas la kanto. Ni devas liberiĝi de l' infanoj, ni kondukos ilin pli profunde en la arbaron, por ke ili ne retrovu la vojon; ne ekzistas alia savo por ni." Granda pezo ekpremegis la koron de l' patro kaj li diris: „Pli bone estus, se vi dividus kun la infanoj vian lastan peceton." Sed ŝi ne volis aŭskulti kaj riproĉis lin: kiu diris *a*, devas diri ankaŭ *b*; ĉar li cedis la unuan fojon, li devas cedi ankaŭ nun.

La infanoj ne dormis kaj aŭdis la interparoladon. Kiam la gepatroj ekdormis, Joĉjo leviĝis, volis iri eksteren kaj kolekti silikojn, kiel antaŭe, sed la patrino ŝlisis la pordon kaj li ne povis eliri. Li konsolis la fratineton kaj diris: „Ne ploru, Margenjo, kaj dormu trankvile. Dio helpos nin."

Frumatene venis la patrino kaj vekis la infanojn. Ili ricevis po peco da pano, sed ĝi estis ankoraŭ pli malgranda ol la unuan fojon. Sur la vojo en la arbaron Joĉjo dispecigis ĝin en la poŝo, ofte haltis kaj ĵetis peceton teren. „Joĉjo, kial vi haltas," diris la patro, „iru vian vojon." „Mi rigardas al mia kolombeto, kiu sidas sur la tegmento kaj volas diri al mi adiaŭ," respondis Joĉjo. „Malsaĝulo," diris la patrino, „tio ne estas via kolombeto, tio estas la matena suno, kiu lumigas la kamentubon." Dume Joĉjo ĵetis ĉiujn pecetojn unu post la alia sur la vojon.

La duonpatrino kondukis ilin ankoraŭ pli profunde en la

JOĈJO KAJ MARGENJO

arbaron, kie ili estis neniam dum sia tuta vivo. Ree oni ekbruligis grandan fajron, kaj la patrino diris: „Sidu ĉi tie, infanoj, kaj kiam vi estos lacaj, vi iom dormu: ni iros en la arbaron haki lignon, kaj vespere, kiam ni finos la laboron, ni revenos kaj kunprenos vin.” Tagmeze Margenjo dividis sian panon kun Joĉjo, kiu disŝutis sian pecon sur la vojon. Poste ili ekdormis kaj vespero pasis, sed neniu venis al la malfeliĉaj infanoj. Ili vekigis nur en malluma nokto kaj Joĉjo konsolis la fratineton per la vortoj: „Atendu, Margenjo, kiam la luno leviĝos, ni vidos la panajn pecetojn; ili montros al ni la vojon hejmen.” Kiam aperis la luno, ili ekiris, sed ili ne trovis la pecetojn, ĉar la miloj da birdoj, kiuj flugas en la arbaro kaj super la kampoj, manĝis la panon. Joĉjo diris al Margenjo: „Ne timu, ni retrovos la vojon,” sed ili ne trovis ĝin. Ili iris la tutan nokton kaj la tutan tagon de l' mateno ĝis la vespero, sed ne eliris el la arbaro. Ili estis tre malsataj, ĉar ili manĝis nur kelke da beroj, kiujn ili trovis sur la tero. Ili estis tiel lacaj, ke la piedoj ne volis plu porti ilin; ili kuŝiĝis sub arbo kaj ekdormis.

Estis jam la tria mateno de l' tempo, kiam ili forlasis la patran domon. Ili ree ekiris antaŭen, sed la arbaro estis pli kaj pli densa. Ili estus pereintaj sen helpo, kiu venis al ili. Tagmeze ili ekvidis sur branĉo belan neĝeblankan birdeton, kiu tiel bele kantis, ke la infanoj haltis kaj aŭskultis. Kiam ĝi finis, ĝi ekŝvingis la flugilojn kaj flugis antaŭ la infanoj. Ili iris post ĝi, ĝis ili venis al dometo. La birdo sidiĝis sur la tegmento. La infanoj proksimiĝis kaj rimarkis, ke la domo estas konstruita el pano kaj kovrita per kukoj; la fenestroj estis el hela sukero. „Jen bona vespermanĝo por ni,” diris Joĉjo. „Mi manĝos pecon el tegmento kaj vi, Margenjo, provu la fenestron, ĝi estas dolĉa.” Joĉjo etendis la manon kaj derompis peceton de l' tegmento, Margenjo stariĝis antaŭ la fenestro kaj mordetis la vitron. Subite voĉo el la domo ekkriis:

JOĈJO KAJ MARGENJO

„Aŭdas mi krak krak mordeton,
Kiu manĝas la dometon?”

La infanoj respondis:

„La vento per sia flugilo
La vento, ĉiela la filo.”

Kaj ili manĝis senĝene. Joĉjo, kiu trovis la tegmenton tre bongusta, deŝiris grandan pecon, Margenjo elpuŝis tutan rondan fenestran vitron kaj manĝis ĝin kun apetito. Subite la pordo malfermiĝis kaj virino, maljuna kiel la mondo, apogante sin sur lambastono, eliris el la domo. Joĉjo kaj Margenjo tiel ektimis, ke ili ellasis el la manoj, kion ili tenis en ili. La maljunulino balancis la kapon kaj diris: „Karaj infanoj, kiu alkondukis vin ĉi tien? Eniru kaj restu ĉe mi sentime.” Ŝi prenis la infanojn per la mano kaj kondukis en la dometon. Bona manĝaĵo estis tie preparita: lakto, dolĉaj kukoj, pomoj kaj nuksoj. Poste oni sternis blankan litaĵon; Joĉjo kaj Margenjo kuŝiĝis en du litoj kaj pensis, ke ili estas en la ĉielo.

La maljunulino nur ŝajnis bonecon. Ŝi estis malica sorĉistino, kiu embuskis kontraŭ la infanoj kaj konstruis la panan domon por allogadi ilin. Ĉiun infanon, kiun ŝi kaptis, ŝi mortigis, kuiris kaj manĝis. Tio estis ŝia festo. La sorĉistinoj havas ruĝajn okulojn kaj ne povas vidi malproksimen, sed ili havas senteman flaradon, kiel la bestoj, kaj sentas, kiam la homoj venas. Kiam Joĉjo kaj Margenjo proksimiĝis, ŝi malice ekridis kaj diris: „Ili jam estas miaj. Ili ne forkuros, ne, ne!” Frumatene, antaŭ kiam la infanoj vekiĝis, ŝi jam estis sur la piedoj kaj rigardante la belajn rozvangajn infanojn en la litoj, ŝi murmuris al si: „Bongusta peceto!” Ŝi kaptis Joĉjon per siaj sekaj manoj, forportis lin en malgrandan stalon kaj fermis la kradpordon. Neniom efikas liaj krioj. Poste ŝi iris al Margenjo, ekskuis ŝin kaj kriis: „Leviĝu! Alportu akvon kaj kuiru ion bonan por via frato. Li sidas en la stalo kaj devas grasiĝi. Kiam li estos grasa, mi lin manĝos.”

JOĈJO KAJ MARGENJO

Margenjo maldolĉe ploris, sed vane; ŝi devis fari, kion postulis la sorĉistino.

Oni kuiris por Joĉjo plej bonan manĝaĵon, sed Margenjo ricevis ĉiam nur kankrajn konkojn. Ĉiumatene la maljunulino iris en la stalon kaj diris: „Joĉjo, etendu la fingrojn, por ke mi palpu, ĉu vi baldaŭ estos grasa.” Sed Joĉjo etendis al ŝi osteton, kaj la maljunulino, kiu havis malklaran vidadon, ne rimarkis tion kaj pensis, ke ĝi estas fingro de Joĉjo. Ŝi miris, ke li tute ne grasiĝas. Pasis kvar semajnoj, kaj Joĉjo ĉiam restis malgrasa; la maljunulino ekmalpacienciĝis kaj ne volis plu atendi: „Margenjo, Margenjo,” kriis ŝi, „rapide alportu akvon, morgaŭ mi buĉos Joĉjon, ĉu li estos grasa aŭ ne.” Ah, kiel ĝemis la malfeliĉa fratineteto, kiam ŝi devis porti akvon, kaj kiel fluis la larmoj sur ŝiaj vangoj. „Dio nia,” ploris ŝi, „kial la sovaĝaj bestoj ne disŝiris nin en la arbaro! Ni estus mortintaj kune.” „Fermu la buŝon!” diris la sorĉistino, „nenio helpos vin.”

En la sekvinta mateno Margenjo devis pendigi kaldronon kun akvo kaj ekbruligi sub ĝi fajron. „Antaŭe ni bakos panon,” diris la maljunulino, „mi jam varmegigis la fornon kaj knedis la paston.” Ŝi alpuŝis la malfeliĉan Margenjon al la forno, el kiu jam eliĝis flamoj. „Enrampu,” diris la maljunulino, „kaj rigardu, ĉu oni jam povas enŝovi la panon!” Se la knabineto farus ĝin, la sorĉistino fermus la fornon por manĝi poste la bakitan infanon. Sed Margenjo komprenis ŝiajn pensojn kaj diris: „Mi ne scias, kiel tion fari.” „Malsaĝa ansero,” diris la krimulino, „la truo estas granda; mi mem povus eniri,” kaj ŝi metis la kapon en la fornon. Margenjo per forta puŝo enigis ŝin profunde kaj riglis la feran pordon. Terure kriegis la sorĉistino, sed Margenjo forkuris kaj la sendia sorĉistino mizere pereis.

Margenjo kuris rekte kiel sago al Joĉjo, malfermis la stalon kaj ekkriis: „Joĉjo, ni estas liberaj, la maljuna sorĉistino ne vivas plu!” Joĉjo elsaltis kiel birdo el kaĝo, kiam oni malfermas al ĝi la pordon. Kiel ĝojis la infanoj, ĉirkaŭprenis kaj kisis unu la alian, kiel ili saltis! Nun ili ne bezonis timi, ili iris en la domon,

JOĈJO KAJ MARGENJO

kie en ĉiuj anguloj staris kestoj plenaj de perloj kaj multekostaj ŝtonoj. „Ili estas ankoraŭ pli belaj ol siliko!”, diris Joĉjo kaj plenigis siajn poŝojn. Ankaŭ Margenjo volis alporti ion hejmen kaj plenigis sian antaŭtukon. „Sed nun ni iru for de ĉi tie por eliri el la sorĉbarbo.” Ili iris kelke da horoj kaj venis al granda akvujo. „Ni ne povas transiri,” diris Joĉjo, „mi ne vidas ponton.” „Nek ŝipeton,” respondis Margenjo, „sed jen naĝas blanka anaso, mi petos, ke ŝi helpu nin.” Ŝi vokis:

„Mankas ponto, ho anaso,
Savu nin el embaraso!”

La anaso proksimiĝis, Joĉjo sidiĝis sur ĝin kaj petis la fratineton sidiĝi apud li. „Ne,” respondis Margenjo, „tro peze estos por la anaseto; ĝi transportos nin unu post la alia.” La bona besteto tion faris kaj la infanoj transveturis feliĉe. Kiam ili iris iom da tempo, la arbaro ŝajnis al ili pli kaj pli konata, kaj fine ili ekvidis de malproksime la patran domon. Ili ekkuris galope, sin ĵetis en la ĉambron kaj falis sur la patran bruston. De l' tempo, kiam la lignohakisto forlasis la infanojn en la arbaro, li ne ĝuis eĉ unu trankvilan tagon; la duonpatrino mortis. Margenjo malplenigis sian antaŭtukon kaj la disŝutitaj perloj kaj multekostaj ŝtonoj saltis en la ĉambro; Joĉjo ĵetis el sia poŝo unu plenmanon post alia. La mizero finiĝis kaj ili ĝoje vivis kune.

Finita estas la fabelo, jen muso kuras en bela felo; kaptu ĝin en sakon kaj el la felo faru jakon.





Steloj talaroj

Estis iam malgranda knabineto, sen patro, sen patrino, kaj ŝi estis tiel malriĉa, ke ŝi havis nek ĉambron por loĝi, nek liton por dormi. Fine restis al ŝi nur la vestoj sur la korpo kaj en la mano peco da pano, kiun donacis al ŝi kompatema koro; sed ŝi estis bona kaj pia. Ĉar ŝi estis forlasita de ĉiuj, ŝi ekmigris, fidante al Dio. Sur sia vojo ŝi renkontis mizerulon, kiu diris: „Donu al mi ion por manĝi, mi estas tre malsata!” Ŝi donis al li sian tutan pecon da pano kaj diris: „Dio, benu vin,” kaj iris antaŭen. Poste ŝi renkontis infanon, kiu ploris kaj diris: „Donu al mi ion por kovri la kapon, malvarme estas al mi.” Ŝi demetis sian ĉapon kaj donis al ĝi. Post momento ŝi vidis infanon, kiu ne havis kaftanon; ŝi donis al ĝi la sian; poste alia petis jupon, ŝi donis la sian. Fine ŝi venis en arbaron, estis jam mallume, venis ankoraŭ unu infano kaj petis ĉemizon. La pia knabino pensis: „Estas malluma nokto, neniuj vidos vin, vi povas doni vian ĉemizon,” demetis ĝin kaj donis al la infano. La knabino restis nuda. Subite la steloj komencis fali de l' ĉielo: ili ne estis steloj, sed brilaj talaroj; kaj kvankam ŝi donacis la ĉemizon, ŝi havis tute novan el plej delikata tolo. Ŝi kolektis la talarojn kaj estis riĉa ĝis la morto.

fiŝkaptisto kaj lia edzino



Estis iam fiŝkaptisto kaj lia edzino, kiuj loĝis kune en malnova budo tuj apud la maro. La fiŝkaptisto ĉiutage ĵetis en la maron sian fiŝhokon kaj tiel li kaptadis kaj kaptadis la fiŝojn.

Foje li sidis sur la mara bordo kaj rigardis la hokon en la klara akvo; li sidis kaj sidis.

La fiŝhoko profundiĝis ĝis la fundo. Li eltiris ĝin kaj rigardas; li kaptis grandan fiŝon. La fiŝo diris al li: „Aŭskultu, kaptisto, lasu al mi la vivon; mi ne estas vera fiŝo, mi estas sorĉita princo. Kiom tio utilos al vi, se vi min mortigos? Mi ne estus por vi granda regalo, ĵetu min en la akvon kaj lasu min naĝi.” „Vi ne bezonas diri tiom da vortoj,” diris la maljunulo, „kompreneble mi liberigos fiŝon, kiu scias paroli.” Li ĵetis en la akvon la fiŝon, kiu profundiĝis ĝis la fundo kaj lasis post si longan sangan strion. La fiŝkaptisto leviĝis kaj revenis al la edzino en la budon. „Vi kaptis nenion hodiaŭ?” diris la virino. „Ne,” respondis la viro, „mi kaptis hodiaŭ fiŝon, kiu diris, ke ĝi estas sorĉita princo; mi ĵetis ĝin en la maron.” „Ĉu vi nenion postulis?” demandis la virino. „Ne,” diris la viro, „kion mi devus postuli?” „Ah,” diris la virino, „malĝoje estas ĉiam loĝi ĉi tie en budo malbonodora kaj abomeninda; kial vi ne postulis malgrandan dometon? Iru al la maro kaj voku la fiŝon; diru al ĝi, ke ni dezirus malgrandan dometon; tute certe ĝi donos ĝin.” „Ah,” diris la viro, „por kio iri tien ankoraŭ unu fojon?” La virino respondis: „Vi

FIŝKAPTISTO KAJ LIA EDZINO


ja kaptis ĝin kaj poste liberigis, ĝi certe donos. Iru tuj." La viro ne volis rifuzi al la edzino kaj iris, sed ne tre volonte.

Kiam li venis al la maro, la akvo estis tute verda kaj flava, ne klara kiel ordinare. Li proksimiĝis al la akvo kaj diris:

„El la ondoj, fiŝo kara,
Venu al la bordo mara;
Ilzo min ĉi tien sendas,
Kaj dometon de vi mendas.”

La fiŝo alnaĝis kaj diris: „Kion vi deziras?” „Vi kaptis ĝin, diris mia edzino, vi devis ion postuli de ĝi. Ŝi ne volas plu loĝi en budo, ŝi dezirus havi dometon.” „Revenu!” respondis la fiŝo, „ŝi jam havas ĝin.”

La fiŝkaptisto foriris. Lia edzino ne sidis plu en budo. Malgranda dometo nun staris tie kaj la virino sidis antaŭ la pordo sur benko. Ŝi prenis lian manon kaj diris: „Eniru kaj rigardu, kia komforto.” Ili eniris. En la dometo estis malgranda vestiblo, bela ĉambro kun kamero; por ambaŭ estis litoj, krom tio kuirejo kaj provizejo, vazaro kupra kaj stana, ĉio pura, brilanta. Post la dometo estis malgranda korto kun kokinoj kaj anasinoj kaj ĝardeno kun legomoj kaj fruktoj. „Rigardu!” diris la virino, „ĉu tio ne estas ĉarma?” „Jes,” respondis la viro, „ĉio restu tia,



FIŜKAPTISTO KAJ LIA EDZINO

ni vivos tute feliĉe.” „Ni pripensos,” diris la virino. Ili manĝis iom kaj iris dormi.

Pasis tiel unu aŭ du semajnoj kaj la virino diris: „Aŭskultu, la dometo ja estas tro malvasta, la korto kaj ĝardeno estas tre malgrandaj. Kial la fiŝo ne donacis al ni pli grandan domon. Mi dezirus loĝi en granda ŝtona kastelo: iru al la fiŝo, ĝi donacu al ni kastelon.” „Ah, virino,” diris la fiŝkaptisto, „la dometo sufiĉas, por kio loĝi en kastelo!” „Eh,” diris la virino, „la fiŝo povas tion fari.” „Ne,” diris la viro, „antaŭ ne longe la fiŝo donacis al ni dometon, mi ne iros nun, mi ne volas ĝin tedi.” „Ĉesu babili!” diris la virino, „la fiŝo povas tion fari kaj donos volonte.” La fiŝkaptisto foriris, sed kun peza koro kaj pensis: tio ne estas prava.

Kiam li venis al la maro, la akvo estis viola kaj blua, griza kaj densa, ĝi ne estis plu verda kaj flava, sed ĝi estis ankoraŭ kvieta. La fiŝkaptisto proksimiĝis kaj diris:

„El la ondoj, fiŝo kara,
Venu al la bordo mara;
Ilzo min ĉi tien sendas,
Kaj kastelon de vi mendas.”

„Kion vi deziras?” demandis la fiŝo. „Ah,” diris malĝoje la kaptisto, „ŝi volas loĝi en granda ŝtona kastelo.” „Iru tien, via edzino staras antaŭ la pordo.”

La fiŝkaptisto iris, pensante, ke li revenas en la domon, sed kiam li venis, tie staris granda ŝtona palaco kaj lia edzino supreniris la ŝtuparon; ŝi prenis lian manon kaj diris: „Eniru”. Ili eniris en la kastelon: la planko estis marmora, amaso da servistoj malfermis al ili larĝe la pordojn. La muroj estis blankaj, kovritaj per belaj tapetoj, en la ĉambroj estis oraj seĝoj kaj tabloj, kaj kristalaj lustroj pendis de sur la plafono. En ĉiuj ĉambroj estis tapiŝoj; manĝaĵo kaj plej bonaj vinoj staris sur la tabloj, kiuj fleksiĝis sub ilia pezo. Post la domo estis granda korto kun staloj por ĉevaloj kaj bovinoj kaj plej belaj kaleŝoj. Ne mankis ankaŭ

FISKAPTISTO KAJ LIA EDZINO

granda, belego ĝardeno kun plej belaj floroj kaj fruktoj. En granda parko, longa duonmejlono, kuris cervoj, kapreoloj kaj leporoj, — ĉio, kion oni povus revii. „Kiaj belaĵoj!” diris la virino. „Jes,” respondis li, „ĉio restu tia, nun ni loĝos en la bela kastelo kaj ni estos feliĉaj.” „Ni pripensos,” diris la virino, „nun ni dormu.” Kaj ili kuŝiĝis.

En la sekvinta tago la edzino vekigis unua. La suno lumis, ŝi rigardis tra la fenestro kaj vidis la pentrindan landon, kuŝantan antaŭ ŝi. La fiŝkaptisto etendis ankoraŭ siajn membrojn, kaj ŝi tuŝegis lin per la kubuto kaj diris: „Leviĝu kaj rigardu tra la fenestro: ĉu ni ne povus regi la landon? Iru al la fiŝo kaj diru, ke ni volas esti reĝoj.” „Ah, virino,” respondis li, „por kio esti reĝoj! Mi ne volas esti reĝo.” „Bone,” diris ŝi, „vi ne volas, sed mi volas esti reĝo. Iru al la fiŝo, mi volas esti reĝo.” „Ah, virino, vi volas esti reĝo, tion mi ne povas diri al ĝi.” „Kial ne? Iru tuj, mi devas esti reĝo.” La fiŝkaptisto iris tute konsternita. „Tio ne estas prava, ne estas prava,” pensis li; tamen li iris.

Kiam li venis al la maro, la akvo estis nigre griza, bolis kaj malbonodoris. La fiŝkaptisto proksimiĝis kaj diris:

„El la ondoj, fiŝo kara,
Venu al la bordo mara;
Iizo min ĉi tien sendas,
Reĝan tronon de vi mendas.”

„Kion vi deziras?” demandis la fiŝo. „Ŝi volas fariĝi reĝo,” respondis li. „Iru, ŝi jam estas reĝo.”

Kiam li revenis al la palaco, li trovis la kastelon multe pli granda, kun alta turo kaj belegaj ornamaĵoj. Gardistoj staris antaŭ la pordego kaj amaso da soldatoj kun tamburoj kaj trumpetoj. En la ĉambroj ĉio estis el pura marmoro kaj oro, veluraj tapiŝoj kaj grandaj oraj penikoj. Malfermiĝis la pordo de l'salono: tie staras ĉiuj korteganoj, lia edzino sidas sur alta trono el oro kaj diamantoj kaj havas grandan oran kronon sur la kapo kaj

FIŝKAPTISTO KAJ LIA EDZINO

en la mano sceptron el pura oro kaj multekostaj ŝtonoj. Ĉe ambaŭ flankoj staras en vico ses virgulinaj, ĉiu unu kapon malpli alta ol la antaŭa. La fiŝkaptisto proksimiĝis kaj diris: „Ah, virino, vi estas reĝo?” „Jes,” respondis ŝi, „nun mi estas reĝo.” La fiŝkaptisto staris kaj rigardis ŝin, fine li diris: „Ah, kiel bele estas, ke vi estas reĝo! Nun ni deziros nenion plu.” „Ne,” respondis ŝi kaj fariĝis malkvieta, „la tempo pasas tiel malrapide, mi enuŝas. Iru al la fiŝo; mi jam estas reĝo, mi volas fariĝi imperiestro.” „Ah, virino,” diris la fiŝkaptisto, „vi volas esti imperiestro?” „Iru al la fiŝo,” diris ŝi, „mi volas esti imperiestro.” „Ah, virino, la fiŝo ne povas fari vin imperiestro, mi ne povas tion diri al ĝi; imperiestro estas nur unu en la regno. La fiŝo ne povas fari vin imperiestro, ne povas, ne povas!” „Kio!” kriis la virino, „mi estas reĝo kaj vi estas nur mia edzo. Iru tuj. Se ĝi faris min reĝo, ĝi povas fari min ankaŭ imperiestro. Iru tuj!” Li devis obei. Li iris kun timo kaj pensis: „Tio ne sukcesos; imperiestro! ŝi postulas tro multe, ŝi fine tedos la fiŝon.”

Kiam li venis al la maro, la akvo estis tute nigra kaj densa kaj tiel bolis, ke veziketoj krevis sur la supraĵo. Forta vento skuis ĝin. La terurita fiŝkaptisto proksimiĝis kaj diris:

„El la ondoj, fiŝo kara,
Venu al la bordo mara;
Ilzo min ĉi tien sendas,
Imperion de vi mendas.”

„Kion vi deziras?” demandis la fiŝo. „Ah fiŝo, mia edzino volas esti imperiestro.” „Iru, ŝi jam estas imperiestro.”

Kiam li revenis hejmen, la tuta kastelo estis el polurita marmoro kun alabastraj figuroj kaj oraj ornamaĵoj. Antaŭ la pordego marŝis soldatoj, blovis trumpetojn kaj batis tamburojn. En la palaco baronoj, grafoj kaj princoj estis servistoj kaj malfermis antaŭ li orajn pordojn. Kiam li eniris, lia edzino sidis sur trono el unu ora peco, longa unu mejlon. Ŝi havis sur la kapo grandegan oran kronon, ornamitan per brilantaj kaj karbunkoloj; en unu

FIŝKAPTISTO KAJ LIA EDZINO

mano ŝi tenis la sceptron, en la alia la imperiestran pomon. Ĉe ambaŭ flankoj staris la gardistoj en du vicoj: plej granda estis grandegulo du mejlojn alta, plej malgranda — pigmeo ne pli alta ol mia malgranda fingro. Antaŭ ŝi staris amaso da grafoj kaj princoj. Time proksimiĝis la fiŝkaptisto kaj diris: „Vi estas nun imperiestro?” „Jes, mi estas imperiestro,” respondis ŝi. Li staris kaj rigardis ŝin, fine li diris: „Bele estas, ke vi estas imperiestro.” „Kial vi staras tie?” respondis ŝi. „Mi estas nun imperiestro, mi volas esti papo; iru al la fiŝo.” „Kion, virino, kion vi deziras! Papo estas nur unu en la tuta kristanaro, la fiŝo ne povas tion fari!” „Iru!” diris ŝi, „mi volas fariĝi papo; hodiaŭ ankoraŭ mi devas esti papo.” „Ne, virino, mi ne povas tion diri, vi jam troas, la fiŝo ne povas fari vin papo.” „Sufiĉe da babilado. Se ĝi povas fari iun imperiestro, ĝi povas fari ankaŭ papo. Rapidu, mi estas imperiestro, vi estas nur mia edzo.”

La fiŝkaptisto foriris malkuraĝe, li tremis pro timo, liaj genuoj kaj kruroj skuiĝis. Terura vento ekblovis, nuboj kovris la ĉielon, fariĝis mallume, kvazaŭ vespere. La folioj falis de l'arboj, la akvo muĝis, bolis kaj batis la bordojn. En malproksimo li vidis ŝipojn, kiuj alarme pafis, saltis kaj dancis sur la ondoj. La ĉielo estis ankoraŭ iomete blua en la mezo, sed ĉirkaŭe ĝi estis terure ruĝa, kiel antaŭ fulmotondro. Li proksimiĝis terurita kaj diris:

„El la ondoj, fiŝo kara,
Venu al la bordo mara;
Ilzo min ĉi tien sendas,
La tiaron de vi mendas.”

„Kion vi deziras?” demandis la fiŝo. „Mia edzino volas fariĝi papo.” „Iru, ŝi jam estas papo.”

La fiŝkaptisto foriris. Kiam li revenis, li vidis grandan preĝejon, ĉirkaŭitan de palacoj. Interne ĉion lumigis miloj da miloj da kandeloj kaj lia edzino, tuta en oro de la kapo ĝis la piedoj, sidis sur trono multe pli alta ol la antaŭa kaj havis sur la kapo tri orajn kronojn. Ĉirkaŭis ŝin amaso da pastroj. Ĉe ambaŭ

FISKAPTISTO KAJ LIA EDZINO

flankoj staris du vicoj da kandeloj, plej alta — kiel grandega turo, plej malgranda — kiel lumingo en la kuirejo. Ĉiuj imperiestroj kaj reĝoj genuis antaŭ ŝi kaj kisis ŝian pantoflon. „Virino,” diris la fiŝkaptisto rigardante ŝin, „vi estas nun papo?” „Jes, mi estas papo.” Li atente ŝin observis kaj ŝajnis al li, ke li vidas sunon. „Ah, kiel bele estas, edzino mia, ke vi estas papo.” Sed ŝi sidis rigida, kvazaŭ ŝtupo, kaj ne moviĝis. Li diris: „Nun vi estos kontenta, vi estas papo, nenion plu vi povus deziri.” „Mi pripensos”, respondis ŝi kaj ili kuŝiĝis.

Sed ŝi ne estis kontenta kaj la avideco ne lasis ŝin dormi; ŝi pensis senĉese, kio ŝi povus ankoraŭ fariĝi.

La fiŝkaptisto dormis bone kaj profunde, ĉar li multe kuris tage, sed ŝi ne povis dormi kaj sin turnis de unu flanko sur la alian, pensante senĉese, kio ŝi povus ankoraŭ fariĝi. Nenion ŝi povis elpensi. Dume leviĝadis la suno. Kiam ŝi ekvidis la matenruĝon, ŝi sidiĝis sur la lito kaj rigardis tra la fenestro; kiam aperis la suno, ŝi ekpensis: „Ah, ĉu mi ne povus ordonadi la leviĝon de la suno kaj luno?” „Leviĝu!” ekkriis ŝi, tuŝegante lin per la kubuto, „iru al la fiŝo, mi volas esti Dio.” La fiŝkaptisto duone dormis ankoraŭ, sed li tiel ektimis, ke li falis de la lito. Li pensis, ke li ne bone aŭdis, frotis la okulojn kaj demandis: „Ah, virino, kion vi diris?” „Se mi ne povos ordoni la leviĝon de la suno kaj luno kaj se mi devos vidi, ke ili leviĝas sen mia ordono, mi ne havos plu trankvilan horon, ĉar mi ne povis ordoni ilin.” Ŝi tiel terure lin ekrigardis, ke li ektremis. „Iru tuj, mi volas esti Dio.” „Ah, virino,” diris li kaj falis antaŭ ŝi sur la genuojn, „la fiŝo ne povas fari tion; ĝi povis fari vin imperiestro kaj papo, mi petas vin, rekonsciĝu kaj restu papo.” Ŝi fariĝis furioza, ŝiaj haroj flugis senorde ĉirkaŭ la kapo, ŝi disŝiris la korsajon kaj ekbatis la edzon per la piedo, kriante: „Mi ne povas plu atendi, iru tuj, ĉu vi ne aŭdas?” Li surtiris la pantalonon kaj ekkuris kvazaŭ freneza.

Ekblovis terura ventego, bruegis kaj muĝis terure. Li apenaŭ povis stari sur la piedoj. La domoj kaj arboj skuĝiĝis, la montoj


FISKAPTISTO KAJ LIA EDZINO

tremis, la ŝtonegoj ruliĝis en la maron, la ĉielo estis nigra, kvazaŭ peĉo. Tondris kaj fulmis, sur la maro leviĝis nigraj ondoj, altaj kiel turoj kaj montoj, kaj ĉiu portis blankan ŝaŭman kronon. La fiŝkaptisto kriis, sed li mem ne aŭdis la proprajn vortojn:

„El la ondoj, fiŝo kara,
Venu al la bordo mara;
Ilzo min ĉi tien sendas,
Dian tronon de vi mendas.”

„Kion ŝi deziras?” demandis la fiŝo. „Ŝi volas esti Dio,” diris la fiŝkaptisto. „Iru, ŝi ree sidas en la budo.”

Kaj ili sidas tie ankoraŭ hodiaŭ.





La edzino de riĉa homo ekmalsanis kaj kiam ŝi sentis, ke ŝia fino proksimiĝas, ŝi alvokis la solan filineton, kiun ŝi havis, al sia lito kaj diris: „Kara infano, restu pia kaj bona, kaj bona Dio ĉiam helpos vin; mi rigardos al vi de la ĉielo kaj ĉiam estos apud vi.” Post ĉi tiuj vortoj ŝi fermis la okulojn kaj spiris la lastan spiron. La knabino ĉiutage iris al la tombo de l' patrino kaj ploris, kaj restis pia kaj bona. Kiam la vintro venis, la neĝo sternis sur la tombo blankan tuketon, kaj kiam printempe la suno fortiris ĝin, la riĉulo prenis alian edzinon.

La virino kunkondukis en la domon du filinojn, kies vizaĝo estis bela kaj blanka, sed kies koro estis abomeninda kaj nigra. Komenciĝis malfacila tempo por la malfeliĉa orfino. „Ĉu la malsaĝa anserino sidos ĉe ni en la ĉambro!” parolis ili, „kiu volas manĝi panon, devas labori por ĝi: for la kuireja knabinaĉo.” Ili forprenis ŝiajn belajn vestojn, surmetis al ŝi grizan malnovan kitelon kaj donis al ŝi lignajn ŝuojn. „Rigardu la fieran principidinon, kiel ornamita ŝi estas!” kriis ili, ridis kaj kondukis ŝin en la kuirejon. Ŝi devis de la mateno ĝis la vespero plenumi malfacilan laboron, leviĝi frue antaŭ la tagiĝo, porti akvon, ekbruligi fajron, kuiri kaj lavi. Krom tio la fratinoj ĉikanis ŝin ĉiamaniere, mokis kaj ŝutis al ŝi la pizojn kaj lentojn en la cindron, kaj ŝi devis sidi longe kaj elekti ilin. Ĉiuvespere laca pro la laboro, ŝi ne havis liton, sed devis kuŝiĝi apud la fajrujo en la cindro. Kaj ĉar pro tio ŝi estis ĉiam malpura kaj kovrita de polvo, oni nomis ŝin Cindrulino.

CINDRULINO

Foje la patro antaŭ la forveturo foiron demandis ambaŭ knabinojn, kion li devas alporti por ili? „Belajn vestojn”, diris unu. „Perlojn kaj altprezajn ŝtonojn,” la alia. „Kaj, vi, Cindrulino,” diris la patro, „kion vi deziras?” „Patro, derompu por mi la unuan branĉeton, kiu ekbatos vian ĉapelon dum via vojaĝo hejmen.” Li aĉetis por la du knabinoj belajn vestojn, perlojn kaj multekostajn ŝtonojn kaj dum la reiro, kiam li rajdis tra verdaj arbetoj, avela branĉeto ekbatis lin kaj deĵetis lian ĉapelon. Li derompis la branĉeton kaj kunprenis ĝin. Kiam li revenis hejmen, li donis al la du knabinoj, kion ili deziris, kaj al Cindrulino la avelan branĉeton. Cindrulino dankis, iris al la tombo de l' patrino kaj plantis tie la branĉeton. Ŝi tiel ploris, ke la larmoj fluis sur ĝin kaj ĝin surverŝis. Ĝi kreskis kaj fariĝis bela arbo. Cindrulino tri fojojn ĉiutage iris tien, ploris kaj preĝis, kaj ĉiufoje venis blanka birdeto, kaj kiam ŝi esprimis deziron, la birdeto ĵetis al ŝi tion, kion ŝi deziris.

Foje la reĝo aranĝis festenon kaj invitis ĉiujn belajn junulinojn de la tuta lando, por ke lia filo elektu edzinon. Kiam la du eksciis, ke ankaŭ ili estas invitataj, ili ekĝojis, alvokis Cindrulino kaj diris: „Kombu niajn harojn, brosu la ŝuojn kaj buku, ni iras al la edziĝa festo en la reĝa kastelo.” Cindrulino obeis, sed ŝi ploris: ankaŭ ŝi dezirus iri kune por danci, kaj ŝi petis la permeson de l' duonpatrino. „Vi Cindrulino, malpura kaj kovrita de polvo volas ĉeesti la festenon? Vi havas nek vestojn, nek ŝuojn, kaj volas danci!” Sed kiam ŝi insiste petis, la malbona virino fine diris: „Mi enŝutis lentojn en la cindron, se vi sukcesos elekti la lentojn dum du horoj, vi povas iri.” La knabino iris tra la posta pordo en la ĝardenon kaj ekkriis: „Vi kolombetoj, vi turtoj, vi ĉiuj birdetoj flugantaj en la aero, venu kaj helpu min elekti la lentojn.”

„La bonaj en la poteton,
Malbonaj en la kropeton.”

Tuj venis al la fenestro de l' kuirejo du blankaj kolombetoj,

CINDRULINO

poste du turtoj kaj fine flirtis kaj svarmis internen ĉiuj birdetoj, flugantaj en la aero kaj malleviĝis al la cindro. La kolombeto klinis la kapojn kaj komencis pok, pok, pok, kaj tiam ankaŭ la aliaj komencis pok, pok, pok, kaj kolektis ĉiujn grajnoj en la pladon. Apenaŭ pasis duonhoro, ili jam finis la laboron kaj elflugis. La knabino alportis la pladon al la duonpatrino, ĝojis



kaj pensis, ke nun ŝi povos iri al la edziĝa festo. Sed la malbona virino diris: „Ne, Cindrulino: nenio helpos vin, vi ne iros kun ni, ĉar vi ne havas vestojn kaj ne scias danci; ni devus honti pro vi.” Ŝi turnis al Cindrulino la dorson kaj forveturis kun la du fieraj filinoj.

Kiam neniu plu estis en la domo, Cindrulino iris al la tombo de l' patrino sub la avelarbo kaj ekkriis:

„Arbo kara skuu, skuu vin,
Arĝenton, oron ŝetu sur min.”

Tuj la birdo ŝetis al ŝi oran kaj arĝentan veston kaj pantoflojn, broditajn per silko kaj arĝento. Rapide, rapide ŝi surmetis la veston kaj iris al la edziĝa festo. La fratinoj kaj duonpatrino ne rekonis ŝin kaj supozis, ke tio estas ia fremda reĝidino, tiel bela ŝi estis en la ora vesto. Pri Cindrulino ili tute forgesis kaj pensis, ke ŝi sidas hejme en la polvo kaj elektas la lentojn el la cindro. La reĝa filo venis renkonte al ŝi, donis al ŝi la manon kaj dancis kun ŝi. Kun neniu alia li volis danci; li ne ellasadis ŝian manon kaj kiam iu alia venis inviti ŝin, li diris: „Tio estas mia dancantino.”

Cindrulino dancis ĝis la vespero kaj tiam ŝi volis reiri hejmen. La reĝido diris: „Mi akompanos vin,” ĉar li volis ekscii, kiu estas la bela knabino. Sed ŝi forkuris de li kaj saltis en la kolom-

CINDRULINO

bejon. La reĝido atendis la alvenon de l' patro kaj rakontis al li, ke la fremda knabino sin kaŝis en la kolombejo. La maljuna ekpensis: „Ĉu tio estas Cindrulino?” Oni devis alporti al li hakilon kaj pioĉon por batfali la kolombejon, sed neniu estis en ĝi.

Kiam la trio revenis hejmen, Cindrulino en sia malpura vesto kuŝis en la cindro kaj malhela olea lampeto brulis sur la kameno, ĉar la knabino estis rapide elsaltinta el la kolombejo tra posta pordo kaj forkurinta al la avelarbo: tie ŝi demetis la belan veston kaj lasis ĝin sur la tombo; la birdo forprenis ĝin kaj ŝi en sia griza kitelo eksidis en la kuirejo sur la cindro.

En la sekvinta tago, kiam rekomenciĝis la balo kaj la gepatroj kun ŝiaj fratinoj forveturis, Cindrulino iris al la avelarbo kaj diris:

„Arbo kara, skuu, skuu vin,
Arĝenton, oron ĵetu sur min.”

La birdo ĵetis veston ankoraŭ pli luksan ol en la unua tago. Kiam la orfino aperis en la salono, ĉiuj ekmiris pro ŝia beleco.



La reĝido jam atendis ŝin, donis al ŝi la manon kaj dancis nur kun ŝi. Kiam aliaj venadis kaj invitis ŝin, li diris: „Tio estas mia dancantino.” Vespere ŝi volis foriri, kaj la reĝa filo sekvis ŝin por vidi, en kiun domon ŝi iras, sed ŝi forkuris de li en la ĝardenon post la domo. Tie

staris granda pirujo, sur kiu pendis plej belaj fruktoj, ŝi suprenrampis tiel lerte kiel sciureto inter la branĉojn. La reĝido ne sciis, kie ŝi sin kaŝis. Li atendis la alvenon de l' patro kaj diris al li: „La fremda knabino forkuris kaj ŝajnas al mi, ke ŝi saltis sur la pirarbon.” La patro pensis: „Ĉu tio estas Cindrulino?” Li ordonis alporti hakilon kaj faligis la arbon, sed neniu estis sur ĝi. Kaj kiam la trio revenis hejmen, Cindrulino kuŝis en la cindro, kiel ordinare, ĉar ŝi desaltis de la alia flanko de

CINDRULINO

l' arbo, redonis la belan veston al la birdo kaj surmetis la grizan kitelon.

En la tria tago, kiam la gepatroj kaj fratinoj forveturis, Cindrulino ree iris al la tombo de l' patrino kaj diris al la arbo:

„Arbo kara, skuu, skuu vin,
Arĝenton, oron ĵetu sur min.”

La birdeto ĵetis al ŝi tiel belan kaj brilan veston, kian neniu iam posedis, kaj la pantofloj estis el pura oro. Kiam ŝi venis tiel vestita, ĉiuj miris tiel, ke ili ne sciis, kion diri. La reĝido dancis nur kun ŝi kaj kiam iu invitadis ŝin, li respondis: „Tio estas mia dancantino.”

Vespere, kiam ŝi estis forironta hejmen, la reĝa filo volis ŝin akompani, sed ŝi forkuris tiel rapide, ke li ne povis sekvi ŝin. Sed li estis preparinta ruzon: la tuta ŝtuparo estis ŝmirita per peĉo; kiam ŝi kuris, ŝia maldekstra pantoflo algluiĝis kaj restis sur la ŝtupo. La reĝido levis ĝin, ĝi estis malgranda, gracia kaj tuta el oro. En la sekvinta mateno li iris kun ĝi al la patro de Cindrulino kaj diris: „Sole tiu estos mia edzino, por kies piedo taŭgas ĉi tiu ora pantoflo.” Ekĝojis ambaŭ fratinoj, ĉar ili havis belajn piedojn; la pli aĝa iris en la kameron kun la pantoflo por provi ĝin, kaj la patrino ĝin rigardis, sed bedaŭrinde la granda piedfingro ne eniris, la pantoflo estis tro malgranda por ŝi. La patrino donis al ŝi tranĉilon kaj diris: „Fortranĉu la piedfingron; kiam vi fariĝos reĝino, vi ne piedirados.” La knabino fortranĉis la piedfingron, superforte enpuŝis la piedon en la pantoflon, kunpremis pro doloro la dentojn kaj iris renkonte al la reĝido. Li prenis ŝin kiel fianĉinon sur la ĉevalon kaj forrajdis kun ŝi. Ili devis preterrajdi la tombon; tie sidis sur la avelarbo du kolombetoj kaj vokis:

„Gruk-ru, gruk-ru, gruk-ru,
sango estas en la ŝu’.

La ŝuo estas tro malgranda, la vera fianĉino ankoraŭ sidas hejme.”

CINDRULINO

La reĝido ekrigardis ŝian piedon kaj ekvidis la elfluantan sangon. Li turnis la ĉevalon, redonis la malveran fianĉinon kaj



diris, ke ŝi ne estas la vera; la alia fratino devas surmeti la ŝuon. La dua iris en la kameron kaj sukcesis enmeti la piedfingrojn, sed la kalkano estis tro granda. La patrino donis al ŝi tranĉilon kaj diris: „Fortranĉu pecon de la kalkano: kiam vi estos reĝino, vi ne piedirados.” La knabino fortranĉis pecon de la kalkano, superforte enpuŝis la piedon en la pantoflon, kunpremis pro doloro la dentojn kaj iris renkonte al la reĝido. Li prenis ŝin kiel fianĉinon sur la ĉevalon kaj forrajdis kun ŝi. Kiam ili preterrajdis la avelarbron, la du kolombetoj sidis tie kaj vokis:

„Gruk-ru, gruk-ru, gruk-ru,
sango estas en la ŝu’.

La ŝuo estas tro malgranda, la vera fianĉino ankoraŭ sidas hejme.”

Li rigardis ŝian piedon kaj vidis la elfluantan sangon, pro kiu ruĝiĝis la blankaj ŝtrumpoj. Li turnis la ĉevalon, redonis la malveran fianĉinon kaj diris: „Ankaŭ ĉi tiu ne estas la vera. Ĉu vi havas neniun alian filinon?” „Ne, diris la patro, de mia mortinta edzino restis nur malgranda, mizera Cindrulino. Sed ŝi sendube ne povas esti la fianĉino.” La reĝido volis vidi ŝin, sed la duonpatrino respondis: „Ah, ne, ne eble; ŝi estas tro malpura, ŝi ne povas sin montri.” La reĝido insistis, kaj oni devis alvoki Cindrulinon. Ŝi lavis al si la manojn kaj vizaĝon puraj, eniris,

CINDRULINO


salutis la reĝidon, kiu donis al ŝi la oran pantoflon; ŝi eksidis sur benketo, eltiris la piedon el la peza ligna ŝuo kaj metis en la pantoflon, kiu estis kvazaŭ fandita por ŝi. Kaj kiam ŝi leviĝis kaj la reĝido ekvidis ŝian vizaĝon, li rekonis la belan knabinon, kiu dancis kun li, kaj ekkriis: „Jen la vera fianĉino.” La duonpatrino kaj la fratinoj ektimis kaj paliĝis pro kolero, kaj li prenis Cindrulino sur la ĉevalon kaj forrajdis kun ŝi. Kiam ili pretterrajdis la avelarbron, la du kolombetoj vokis:

„Gruk-ru, gruk-ru, gruk-ru,
sango ne estas en la ŝu’.

La ŝuo ne estas tro malgranda. La veran fianĉinon li kondukas hejmen.”

Dirinte tion, ili deflugis de l’ arbo kaj eksidis sur la ŝultroj de Cindrulino, unu sur la dekstra, la alia sur la maldekstra, kaj restis tie.

Kiam venis la tempo de l’ edziĝo, la malsinceraj fratinoj volis per flato akiri la favoron de la juna reĝino kaj partopreni ŝian feliĉon. Kiam la edziĝontoj iris al la preĝejo, la pli aĝa fratino estis ĉe la dekstra flanko de Cindrulino, la malpli aĝa ĉe la maldekstra; la kolombetoj elpikis al ambaŭ po unu okulo. Poste, dum la reveno, la pli aĝa estis ĉe la maldekstra flanko, la malpli aĝa ĉe la dekstra: la kolombetoj elpikis al ambaŭ la alian okulon. Tiel ilia malboneco kaj malsincereco estis punitaj per blindeco eterna.



Fablo „kovru vin” orazeno kaj bastono el sako



Estis iam tajloro, kiu havis tri filojn kaj nur unu kaprino. Ĉar la kaprino nutris per sia lakto la tutan familion, oni devis doni al ŝi bonan nutraĵon kaj konduki ŝin ĉiutage sur la paŝtejon. La filoj paŝtis ŝin unu post la alia. Foje la plej aĝa filo kondukis ŝin en la tombejon, kie la plej bela herbo kreskis. Ŝi paŝtis sin tie kaj saltis. Vespere, kiam proksimiĝis la tempo por reveni hejmen, li demandis: „Kaprinò, ĉu vi estas sata?” La kaprino respondis:

„Manĝis mi kaj estas sata
De la herbo aromata.
Me, meel!”

„Venu do hejmen,” diris la junulo, prenis ŝian ŝnuron, kondukis ŝin en la stalon kaj alligis. „Ĉu la kaprino havis sufiĉe da nutraĵo?” demandis la maljuna tajloro. „Ho jes,” respondis la filo, „manĝis ŝi kaj estas sata de la herbo aromata.” Sed la patro volis mem konvinkiĝi, iris en la stalon, karesis la karan beston kaj demandis: „Kaprinò, ĉu vi estas sata?” La kaprino respondis:

„Saltis mi, nenion trovis,
Kiel mi satiĝi povis?
Me! meel!”

„Kion mi aŭdas!” ekkriis la tajloro, kuris al la knabo kaj diris: „Mensogulo! Vi diris, ke la kaprino estas sata, kaj lasis ŝin fasti?”

TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

En granda kolero li prenis de l' muro la ulnon kaj per batoj forpelis la filon.

En la sekvinta tago estis la vico de la dua filo. Li trovis apud la plektobarilo de l' ĝardeno lokon, kie kreskis bela herbo. La kaprino manĝis ĝin kaj lasis neniom. Vespere, kiam proksimiĝis la tempo por reveni hejmen, li demandis: „Kaprino, ĉu vi estas sata?” La kaprino respondis:

„Manĝis mi kaj estas sata
De la herbo aromata.
Me! mee!”

„Venu do hejmen,” diris la junulo, tiris ŝin en la stalon kaj alligis. „Ĉu la kaprino havis sufiĉe da nutraĵo?” demandis la maljuna tajloro. „Ho jes,” respondis la filo, „manĝis ŝi kaj estas sata de la herbo aromata.” La tajloro, kiu volis mem vidi tion, iris en la stalon kaj demandis: „Kaprino, ĉu vi estas sata?” La kaprino respondis:

„Saltis mi, nenion trovis,
Kiel mi satiĝi povis?
Me! mee!”

„Sendia fripono!” kriis la tajloro, „li lasis fasti tiel noblan beston!” kaj forpelis lin per la ulno.

Venis la vico de l' tria filo. Por bone plenumi la taskon, li trovis arbetaron kun plej belaj folioj kaj paŝtis tie la kaprilon. Vespere, kiam li estis revenonta, li demandis: „Kaprino, ĉu vi estas sata?” La kaprino respondis:

„Manĝis mi kaj estas sata
De verdaĵo aromata.
Me! mee!”

„Venu do hejmen,” diris la knabo, kondukis ŝin en la stalon kaj alligis. „Ĉu la kaprino havis sufiĉe da manĝaĵo?” demandis la maljuna tajloro. „Ho jes,” respondis la filo, „manĝis ŝi kaj estas sata de verdaĵo aromata.” La tajloro ne fidis, iris en la

TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

stalon kaj demandis: „Kaprino, ĉu vi estas sata?” La malica besto respondis:

„Saltis mi, nenion trovis,
Kiel mi satiĝi povis?
Me! me!”

„Gento de mensoguloj!” ekkriis la tajloro, „unu same sendia kaj malzorga, kiel alia! Trompu alian, malsaĝulon!” Kolera li kuris en la domon kaj tiel draŝis per la ulno la dorson de l' knabo, ke la junulo forkuris.

La maljuna tajloro restis sola kun la kaprino. En la sekvinta tago li iris en la stalon, karesis la kaprilon kaj diris: „Venu, kara besteto, mi mem kondukos vin en la paŝtejon.” Li kondukis ŝin al verdaj plektobariloj, al altaj herboj kaj en aliajn lokojn, kie la kaprinoj volonte sin paŝtas: „Tiuĉifoje vi satmanĝos laŭ via volo,” diris li kaj paŝtis ŝin ĝis la vespero. Tiam li demandis: „Kaprino, ĉu vi estas sata?” Ŝi respondis:

„Manĝis mi kaj estas sata
De la herbo aromata.
Me! me!”

„Venu do hejmen,” diris la tajloro, kondukis ŝin en la stalon kaj alligis. Forirante li sin returnis al ŝi kaj demandis ankoraŭ unu fojon: „Fine vi satmanĝis?” Sed la kaprino kondukis kontraŭ li ne pli bone ol kontraŭ la aliaj kaj respondis:

„Saltis mi, nenion trovis,
Kiel mi satiĝi povis?
Me! me!”

Aŭdinte tion, la tajloro ekmiris kaj komprenis, ke li maljuste forpelis siajn filojn. „Atendu!” kriis li, „vi sendanka kreitaĵo! Ne sufiĉas forpeli vin. Mi signos vin tiel, ke vi neniam kuraĝos montri vin inter honestaj tajloroj.” Li rapide alportis razilon, sapumis la kapon de la kaprino kaj razis ŝin glata, kvazaŭ manplato. Ĉar la ulno tro honorus ŝin, li alportis vipon kaj tiel regalis ŝin, ke la kaprino forkuris salte.

TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

La tajloro, tute sola, ekmalĝojis. Li dezirus havi ĉe si la filojn, sed neniu sciis, kien forpelis ilin la sorto. La plej aĝa fariĝis lernanto de lignaĵisto. Li lernis diligente kaj persiste. Kiam venis la tempo entrepreni metian migradon, la majstro donacis al li tablon. Ĝi estis tute simpla kaj el ordinara ligno, sed havis bonegan eĉon: kiam oni starigis ĝin antaŭ sin kaj diris: „Tableto, kovru vin,” la bona tablo tuj estis kovrita per pura tuko, aperis sur ĝi telero, tranĉilo kaj forko, pladoj kun rostaĵoj kaj kuirajoj kaj granda glaso da ruĝa brila vino, kiu ĝojigis la koron. La junulo pensis: „Tio sufiĉos por tuta via vivo,” kaj esperplena ekiris en la vastan mondon. Li tute ne zorgis, ĉu gastejo estas bona, ĉu oni povas trovi tie manĝon aŭ ne. Se tio plaĉis al li, li eĉ tute ne eniradis, sed sur kampo aŭ herbejo aŭ en arbaro li demetis de l' dorso la tablon, starigis ĝin antaŭ sin kaj diris: „Kovru vin!” kaj li havis ĉion, kion li bezonis. Fine li ekdeziris



reveni al la patro, esperante, ke lia kolero dume kvietiĝis kaj ke li volonte akceptos la filon kun la tablo „kovru vin.” Vespere li venis en gastejon plenan de vojaĝantoj, kiuj afable invitis lin sidiĝi ĉe ilia tablo, ĉar alie li nenion ricevos. „Ne,” respondis la lignaĵisto, „mi ne volas forpreni de via buŝo la lastajn pecojn, prefere mi mem regalos vin.” Ili ridis, pensante, ke li ŝercas, sed li starigis la lignan tablon en la mezo de l' ĉambro kaj diris: „Tablo, kovru vin!” Tuj la tablo estis kovrita per manĝaĵoj, kiajn ne povus liveri la kuirejo de l' mastro. Laodoro agrable tiklis la nazojn de l' gastejo. „Sinjoroj, mi petas vin, al la tablo!” diris la lignaĵisto. Li ne bezonis inviti ilin duan fojon; ili proksimiĝis, eltiris la tranĉilojn kaj brave komencis la atakon. Plej multe mirigis ilin, ke apenaŭ iu plado malpleniĝis, tuj aperis alia tute plena. La mastro staris en angulo, rigardis kaj ne sciis, kion diri. Li pensis: „Utila estus tia kuiristo en via gastejo!” La lignaĵisto kaj liaj kunuloj amuziĝis ĝis malfrua nokto. Fine

TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

ili iris dormi. Ankaŭ la junulo kuŝiĝis kaj starigis la tablon apud la muro. La pensoj ne lasis la mastron trankvila. Li rememoris, ke li posedas tute similan tablon en la subtegmento, senbrue alportis ĝin kaj lasis ĝin, preninte la miraklan. En la sekvinta tago la lignaŝisto pagis por la nokto, nenion rimarkinte prenis la tablon kaj foriris. Tagmeze li venis al la patro, kiu akceptis lin kun granda ĝojo. „Kara filo,” demandis li, „kion vi ellernis?” „Patro, mi estas lignaŝisto.” „Bona metio,” respondis la maljunulo, „sed kion vi alportis de via migrado?” „La plej bona afero, kiun mi alportis, estas ĉi tiu tableto.” La tajloro rigardis la tableton de ĉiuj flankoj kaj diris: „Via majstroverko ne valoras multe, ĝi estas malnova kaj malbona tableto.” „Sed ĝi estas tableto „kovru vin,” respondis la filo. „Kiam mi starigas ĝin kaj diras: kovru vin, tuj aperas sur ĝi bongustaj manĝaĵoj kaj vino, kiu ĝojigas la koron! Invitu ĉiujn parencojn kaj amikojn, la tableto regalos ilin kaj ĉiuj satmanĝos.” Kiam la gastoj kunvenis, li starigis sian tableton en la mezo de l' ĉambro kaj diris: „Tableto, kovru vin!” Sed la tableto ne moviĝis kaj staris malplena kiel ĉiu alia, kiu ne komprenas la sorĉvortojn. La malfeliĉa junulo komprenis, ke oni ŝanĝis al li la tableton. Li hontis, ke li ŝajnis mensogulo, kaj la parencoj ridis lin kaj devis reveni hejmen kun malplena stomako. La patro rekomencis sian tajloran laboron, kaj la filo eklaboris ĉe majstro.

La dua filo venis al muelisto kaj fariĝis lia lernanto. Kiam li jam ellernis la metion, la majstro diris: „Via konduto ĉiam estis laŭdinda, rekompence mi donacos al vi neordinaran azenon, kiu ne tiras veturilon, nek portas sakojn.” „Kion do ĝi faras?” demandis la junulo. „Ĝi sputas oron,” respondis la majstro. „Se vi starigas ĝin sur tuko kaj diras: „briklebrit”, la bona besto sputas al vi oron, malantaŭe kaj antaŭe.” „Bona afero,” diris la junulo, dankis la mastron kaj foriris en la vastan mondon. Kiam li bezonis monon, li nur diris al la azeno „briklebrit”, kaj la oro falis kvazaŭ pluvo; li nur kolektis ĝin de l' tero. Ĉie, kien

TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

li venis, la plej bonaj objektoj ne estis tro bonaj por li, kaj ju pli karaj ili estis, des pli bone, ĉar lia poŝo ĉiam estis plena. Iom da tempo li migris tiamaniere en la mondo kaj fine ekpensis: „Mi devas trovi mian patron; kiam mi venos kun mia azeno, li forgesos la koleron kaj bone min akceptos.” Li eniris okaze en la saman gastejon, kie oni ŝtelis al lia frato la tableton. Li kondukis post si la azenon, kaj la mastro volis alligi ĝin, sed la junulo diris: „Mi dankas vin, mi mem kondukos mian grizulon en la stalon kaj mem alligos ĝin, ĉar mi devas scii, kie ĝi staras.” Tio ŝajnis stranga al la mastro kaj li pensis, ke tiu, kiu mem devas zorgi pri sia azeno, ne havas tre plenan poŝon. Sed kiam la veninto metis la manon en la poŝon, eliris du orajn monerojn kaj mendis bonan vespermanĝon, li larĝe malfermis la okulojn, ekkuris kaj elektis, kion li havas plej bonan en la provizejo. Post la vespermanĝo la gasto demandis, kiom li ŝuldas. La mastro ne ŝparis la poŝon de l' junulo kaj diris, ke li devas aldoni ankoraŭ du orajn monerojn. La junulo serĉis en la poŝo, sed trovis tie nenion. „Atendu momenton, sinjoro mastro,” diris li, „mi iros kaj alportos monon,” kaj kunprenis la tablotukon. La mastro komprenis neniom, scivola sekvis lin senbrue kaj, ĉar la gasto riglis la pordon de l' stalo, li rigardis tra fendo. La muelisto sternis la tukon sub la azeno kaj ekkriis: „briklebrit” — kaj en la sama momento la besto komencis sputi la oron, kiu falis kvazaŭ hajlo. „Mil diabloj,” diris la mastro, „jen tute novaj dukatoj! Ne malbona estas tia monujo!” La gasto pagis sian kalkulon kaj kuŝiĝis; la mastro nokte ŝteliris en la stalon, elkondukis la moneriston kaj alligis anstataŭe alian azenon.



En la sekvinta mateno la muelisto frue foriris kun la azeno, suspektante nenion. Tagmeze li venis al la patro, kiu ĝoje lin akceptis. „Kion vi ellernis, kara filo?” demandis la patro. „Patro, mi estas muelisto.” „Kion vi alportis de via migrado?” „Nur


TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

azenon.” „Ne mankas azenoj ĉi tie,” diris la tajloro, „mi preferus bonan kaprinon.” „Ĝi ne estas ordinara besto, ĝi estas mirakla azeno: kiam mi diras: „briklebrit”, la bona kreitaĵo sputas plentukon da oro. Invitu ĉiujn parencojn, mi ilin ĉiujn faros riĉaj homoj.” „Tio tre plaĉas al mi,” diris la patro, „mi plu ne turmentos min per la kudrado.” Kaj li rapidis kunvoki la parencojn. Kiam ĉiuj kunvenis, la muelisto petis ilin sidiĝi, sternis la tukon kaj alkondukis la azenon. „Atentu nun,” diris li kaj ekkriis „briklebrit” — sed tio, kio falis sur la tukon, ne similis orajn monerojn. Montriĝis, ke la besto ne scias la artifikon, ĉar ne ĉiu azeno ĝin scias. Malĝoja fariĝis la mieno de la kompatinda muelisto; li komprenis, ke oni trompis lin, petis pardonon de la parencoj, kiuj devis foriri same malriĉaj, kiel ili venis. La tajloro rekomencis sian laboron, kaj la filo sin dungigis en muelejo.

La tria filo fariĝis lernanto de tornisto kaj ĉar la metio estas malfacila, li lernis pli longe ol la fratoj. Ili sciigis al li per letero sian malsukceson kaj kiel la gastejestro ŝtelis al ili en la lasta vespero la miraklajn donacojn. Kiam la tornisto ellernis la metion, la majstro rekompence por lia bona konduto donacis al li sakon kaj diris: „En ĝi estas bastono.” „La sakon mi metos sur la dorson, ĝi povos estis utila al mi, sed por kio taŭgas la bastono? Ĝi estos nur superflua ŝarĝo.” „Mi tuj klarigos al vi,” diris la majstro, „se iu ofendos vin, vi diru nur: „Bastono, el la sako!” kaj la bastono elsaltos inter la homojn kaj tiel dancos sur iliaj dorsoj, ke ili ne povos moviĝi ok tagojn; ĝi ĉesos bati ne pli frue, ol kiam vi diros: „Bastono, en la sakon!” La junulo dankis lin kaj ekiris kun la sako sur la dorso. Ĉiufoje, kiam iu tro proksimiĝis al li kaj volis lin tuŝi, li diris: „Bastono, el la sako!” La bastono saltis eksteren kaj batis la surtutojn aŭ kamizolojn sur la dorsoj, ne atendente senvestiĝon; rapide ĝi laboris kaj neniu atendis longe sian vicon! La juna tornisto venis vespere en la gastejon, kie liaj fratoj estis trompitaĵ. Li metis la sakon antaŭ si sur la tablon kaj komencis rakonti pri ĉio rimarkinda, kion li vidis en la mondo. „Jes,” diris li, „ekzistas tabletoj „kovru vin”,

TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

orazenoj kaj alio simila — bonaj objektoj, kiujn mi ne malŝatas; sed ĉio tio valoras neniom kompare kun la trezoro, kiun mi akiris kaj kiun mi havas en la sako.” La mastro levis la orelojn: „Kion, mil diabloj, li posedas,” pensis li, „kredeble la sako estas plena de diamantoj. Mi tre dezirus aligi ilin al la tableto kaj azeno, ĉar ĉiuj bonaj aferoj kuniĝas triope.” Kiam venis la tempo por dormi, la gasto sin etendis sur la benko kaj sub la kapon metis la sakon, kiel kusenon. Kiam la mastro pensis, ke la junulo jam profunde dormas, li proksimiĝis, senbrue kaj singarde tiris la sakon provante, ĉu li sukcesos fortiri ĝin kaj meti anstataŭe alian. La tornisto jam longe atendis tion kaj kiam la mastro estis forte tironta, la junulo ekkriis: „Bastono, el la sako!” La bastono tuj elsaltis al la ŝtelisto kaj malavare regalis lin. La mastro kriis, petante kompaton, sed ju pli laŭte li kriis, des pli forte la bastono batis la takton sur lia dorso. Fine tute senfortiĝinta la mastro falis teren. Tiam la tornisto diris: „Se vi ne redonos la tableton „kovru vin” kaj la orazenon, la danco tuj rekomenciĝos.” „Oh, ne, ne,” diris la mastro per mallaŭta voĉo, „mi volonte redonos ĉion, nur ordonu la malbenitan koboldon reveni en la sakon.” La junulo diris: „Bone, mi ekkompatos vin, sed memoru bone la lecionon!” Li ekkriis: „Bastono, en la sakon” kaj liberigis la mastron.



En la sekvinta tago la tornisto ekiris al la patro kun la tableto „kovru vin” kaj kun la orazeno. La patro ĝoje akceptis lin kaj demandis, kion li ellernis. „Kara patro,” diris la junulo, „mi estas tornisto.” „Bela metio!” diris la patro, „kaj kion vi alportis de via migrado?” „Multvaloran objekton, kara patro, bastonon en la sako.” „Kion?” ekkriis la patro, „bastonon? Ĝi ne indis la penon! Vi povas fari ĝin ankaŭ ĉe ni el iu ajn branĉo.” „Sed ne tian, kara patro! Kiam mi diras al ĝi: „Bastono, el la sako,”


TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

ĝi elsaltas kaj batas tiujn, kiuj havas malbonajn intencojn kontraŭ mi. Ĝi ne ĉesas, ĝis ili kuŝas tere kaj petas kompaton. Rigardu, per ĝi mi reprenis la tableton „kovru vin” kaj la orazenon, kiujn la gastejmastro fripone ŝtelis al miaj fratoj. Alvoku ilin ambaŭ kaj invitu ĉiujn parencojn, mi regalos ilin kaj plenigos iliajn poŝojn per oro.” La maljuna tajloro ne tre fidis, kunvokis tamen la parencojn. La tornisto sternis tukon en la ĉambro, enkondukis la orazenon kaj diris al la frato: „Nu, kara frato, parolu kun ĝi.” La muelisto diris „briklebrit” kaj en la sama momento oraj moneroj ekpluvis sur la tukon. La azeno ne ĉesis, ĝis ĉiuj havis tiom da oro, ke ili ne povis forporti pli multe. (Mi vidas, ke ankaŭ vi dezirus esti kun ili!) Poste la tornisto alportis la tableton kaj diris: „Nu, kara frato, parolu kun ĝi” Apenaŭ la lignaĵisto diris: „kovru vin,” ĝi jam estis kovrita kaj plena de plej bonaj manĝaĵoj. Komenciĝis festeno, kian la bona tajloro neniam antaŭe vidis en sia domo; la tuta parenĉaro restis kune ĝis la noktomezo; ĉiuj estis gajaj kaj kontentaj. La tajloro ŝlosis en la ŝranko la kudrilon, fadenojn, gladilon kaj ulnon kaj vivis kun siaj tri filoj vivon feliĉan kaj trankvilan.

Sed kia estis la sorto de l' kaprino, pro kiu la tajloro forpelis siajn filojn? Mi rakontos tion al vi. Ŝi hontis pro sia senhara kapo kaj kaŝis sin en neston de vulpo. Kiam la vulpo revenis hejmen, paro da grandaj okuloj ekbrilis antaŭ ĝi en la mallumo. Ĝi ektimis kaj forkuris. Urso renkontis ĝin kaj, vidante ĝian konfuzon, demandis: „Kio estas al vi? Kial vi faras grimacojn?” „Ah,” respondis la flavulo, „terura monstro sidas en mia nesto! Ĝi ekrigardis min per siaj fajraj okuloj.” „Ni tuj forpelos ĝin,” diris la urso, iris kun la vulpo al ĝia nesto kaj ekrigardis internen; sed kiam ĝi vidis la fajrajn okulojn, ankaŭ ĝi ektimis kaj forkuris de la terura besto. Abelo renkontis la urson kaj, vidante, ke ĝi ne sentas sin tre bone en sia haŭto, diris: „Urso, kia malĝoja mieno, kie estas via gajeco?” „Ne babilu, terura besto kun fajraj okuloj sidas en la nesto de l' flavulo kaj ni ne povas ĝin forpeli.” La abelo diris: „Mi domaĝas vin, urso. Mi estas malgranda,

TABLO „KOVRU VIN”, ORAZENO KAJ BASTONO EL SAKO

malforta kreitaĵo, kiun vi tute ne rigardas sur via vojo, tamen mi esperas, ke mi povos vin helpi.” Ĝi flugis en la vulpan neston, sidigis sur la glata, razita kapo de l’ kaprino kaj tiel forte ŝin pikis, ke ŝi elsaltis, kriis mel meel kaj forkuris kiel furioza en la arbaron. De tiu tempo neniu scias, kie ŝi estas.





Iu patro havis du filojn. La pli aĝa estis saĝa, prudenta kaj lerta, la pli juna estis malsaĝa, povis nenion kompreni kaj lerni. La homoj, rigardante lin, diris: „Li estos ŝarĝo por la patro!” Kiam oni devis ion fari, ĉiam la pli aĝa devis ĝin plenumi; sed kiam la patro sendis lin malfrue vespere aŭ nokte, kaj la vojo estis tra tombejo aŭ alia timiga loko, li ĉiufoje respondis: „Oh ne, patro, mi ne iros tien, mi timas.” Kiam vespere ĉe la fajrujo oni rakontis fabelojn, kiuj tremigis la aŭskultantojn, ili iafoje diris: „Ah, kiel mi timas!” sed la pli juna sidas en angulo, aŭskultas, kaj ne povas kompreni, kion tio signifas. „Oni ĉiam diras: mi timas! mi timas! Mi ne timas, kredeble tio estas artifiko, kiun mi ne konas.”

Foje la patro diris al li: „Aŭskultu, vi en la angulo, vi fariĝas granda kaj forta. Vi devas ion ellerni kaj mem trovi por vi la panon. Vi vidas, kiel via frato penas, sed via laboro ĉiam estas vana.” „Patro,” respondis la filo, „mi volonte lernus ion; mi volus ellerni, kio estas la timo, mi tute ne komprenas tion.” La pli aĝa ridis kaj pensis: „Dio mia, kia malsaĝulo estas mia frato, li neniam taŭgos por io: se ne lernas la infano, ĝi ne estos kaptano.”

Post iom da tempo orgenisto vizitis la domon. La patro plendis pri sia ĉagreno kaj rakontis, ke la pli juna filo taŭgas por nenio, nenion scias kaj lernas nenion: „Imagu, kiam mi demandis lin, kiun metion li volas lerni, li respondis, ke li dezirus ellerni, kio estas la timo.” „Se sole tion li deziras,” respondis la orgenisto,

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

„li povas ĝin ellerni ĉe mi; lasu lin en mian domon, mi lin poluros.” La patro estis kontenta, ĉar li pensis: „En ĉiu okazo la knabo iom profitos.” La orgenisto prenis la knabon en sian domon kaj li devis sonorigi en la preĝejo. Post kelke da tagoj la orgenisto vekis la knabon noktomeze, ordonis al li leviĝi, suriri la preĝejan turon kaj sonorigi. „Mi instruos vin, kio estos la timo,” pensis la orgenisto kaj iris sekrete antaŭe. La knabo suriris la turon, ĉirkaŭrigardis kaj kiam li volis preni en la manon la ŝnuron, li ekvidis sur la ŝtuparo, kontraŭ la fenestro, blankan figuron. „Kiu estas tie?” demandis li, sed la figuro ne respondis, ne moviĝis. „Respondu,” ekkriis la junulo, „aŭ iru for, vi havas ĉi tie nokte nenion por fari!” La orgenisto staris senmova, por kredigi al la junulo, ke tio estas fantomo. La knabo ree kriis: „Kion vi volas? Parolu, se vi estas honesta homo; se ne, mi faligos vin de l' ŝtuparo.” La orgenisto pensis: „Li tion ne faros,” ne respondis kaj staris kvazaŭ ŝtona. La knabo trian fojon alparolis lin, sed vane. Tiam li ekkuris kaj tiel depuŝis de l' ŝtuparo la fantomon, ke ĝi rulfalis dek ŝtupojn kaj restis senmova en angulo. La knabo sonorigis, revenis en la domon, ne dirinte eĉ unu vorton, kuŝiĝis kaj ekdormis. La edzino de l' orgenisto longe atendis la edzon, sed li ne revenis. Fine ŝi ektimis, vekis la knabon kaj demandis: „Ĉu vi ne scias, kie restis mia edzo? Li suriris antaŭ vi la turon.” „Ne,” respondis la knabo. „Iu staris sur la ŝtuparo kontraŭ la fenestro, kaj ĉar li volis nek respondi, nek foriri, mi pensis, ke li estas ŝtelisto kaj mi faligis lin de l' ŝtuparo. Iru tien, vi vidos, ĉu tio estis via edzo. Se jes, granda domaĝo estas.” La virino kuris tien kaj trovis la edzon en angulo; li kuŝis kaj ĝemis, ĉar unu lia piedo estis rompita.

Ŝi portis la edzon malsupren kaj kun laŭtaj krioj rapidis al la patro de l' junulo. „Via filo,” kriis ŝi, „kaŭzis grandan malfeliĉon! Li deĵetis mian edzon de l' ŝtuparo, tiel ke li rompis unu piedon al la malfeliĉulo. Reprenu la friponon el nia domo!” La patro ektimis, kuris al la knabo kaj severe riproĉis lin: „Kiaj sendiaj agoj! La diablo, ŝajnas, inspiris vin!” „Patro,” respondis

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

li, „aŭskultu min, mi estas senkulpa: li staris en la mallumo, kiel iu, kiu havas malbonajn intencojn. Mi ne sciis, kiu li estas kaj trifoje mi admonis lin respondi aŭ foriri.” „Ah,” diris la patro, „vi alportas nur malfeliĉojn. For de miaj okuloj, mi ne volas plu vidi vin.” „Bone, patro, atendu nur ĝis la tagiĝo; mi foriros lerni la timon: mi scios arton, kiu nutros min!” „Lernu, kion vi volas,” diris la patro, „tio estas por mi indiferenta. Jen estas 50 talaroj, iru en la vastan mondon kaj al neniu diru, de kie vi venas kaj kiu estas via patro, ĉar mi hontas pro vi!” „Bone, patro, kiel vi volas. Se vi postulas nenion plu, mi povas facile plenumi vian volon.”

Kiam leviĝis la suno, la knabo metis la talarojn en la poŝon, ekiris sur la grandan vojon kaj senĉese ripetis al si: „Ah, se mi timus, se mi timus.” Homo iris sur la vojo, aŭdis la vortojn, kiujn la knabo diris al si mem, kaj kiam ili proksimiĝis al pendigilo, li diris: „Ĉu vi vidas tie la arbon, kie sep junuloj festis la edziĝon kun la filino de l' ŝnurfaristo kaj nun lernas flugi: sidiĝu tie kaj atendu la nokton, vi lernos la timon.” „Se oni bezonas nenion plu, la afero estas facile farebla. Revenu morgaŭ matene: se mi tiel rapide lernos la timon, vi ricevos miajn 50 talarojn.” La knabo iris al la pendigilo, sidiĝis sub ĝi kaj atendis ĝis la vespero. Estis malvarme, la knabo ekbruligis fajron; sed noktomeze ekblovis tiel malvarma vento, ke la knabo ne povis sin varmigi malgraŭ la fajro. Kiam li vidis, ke la vento movas la pendigitajn, kiuj tuŝegas unu alian, li pensis: „Mi frostiĝas ĉi tie ĉe la fajro, kiel ili devas frostiĝi kaj tremi tie supre!” Li estis kompatema: li alstarigis ŝtupetaron, supreniris, malligis ĉiujn sep kaj portis ilin malsupren. Poste por ekflamigi la karbojn li blovis sur la fajron kaj sidigis ilin ĉirkaŭe. Sed ili sidis senmovaj kaj la fajro ekbruligis iliajn vestojn. „Gardu vin,” kriis la knabo, „alie mi ree vin pendigos!” La mortintoj aŭdis nenion, silentis, kaj iliaj ĉifonoj brulis. La knabo ekkoleris kaj diris: „Vi ne volas vin gardi? Bone, sed mi tute ne intencas bruli kun vi,”

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

li ree pendigis ilin, sidiĝis ĉe la fajro kaj ekdormis. En la sekvinta tago venis al li la sama homo por ricevi la 50 talarojn kaj diris: „Nun vi scias, kio estas la timo!” „Ne,” respondis la knabo, „de kie mi povus scii? Ĉi tiuj supre ne malfermis la buŝon; ili estis tiel malsaĝaj, ke ili lasis bruli siajn ĉifonojn.” La homo vidis, ke li ne ricevos la 50 talarojn, foriris kaj diris: „Tian mi ne vidis ankoraŭ!”

La knabo iris sian vojon kaj ree ripetis al si: „Ah, se mi timus, se mi timus!” Veturigisto, kiu iris post li, demandis: „Kiu vi estas?” „Mi ne scias,” respondis la junulo. La veturigisto daŭrigis: „De kie vi venas?” „Mi ne scias.” „Kiu estas via patro?” „Tion mi ne povas diri.” „Kion vi murmuras senĉese?” „Mi volus lerni la timon, sed neniuj povas instrui min.” „Ĉesu babili sensencaĵojn,” diris la veturigisto, „iru kun mi, eble mi loĝigos vin.” La knabo iris kun la veturigisto, kaj vespere ili venis en gastejon, kie ili estis pasigontaj la nokton. Enirante en la ĉambron, la knabo ree diris: „Ah, se mi timus, se mi timus!” La mastro, aŭdinte tion, ekridis kaj diris: „Se vi tion serĉas, vi trovos ĉi tie bonan okazon.” „Silentu!” diris lia edzino, „multaj kuraĝuloj jam perdis tie la vivon. Domage estus, se ĉi tiuj belaj okuloj ne vidus plu la tagan lumon.” La knabo diris: „Kiel ajn malfacila ĝi estas, mi volas ĝin lerni, mi ja por tio migras en la mondo.” Li ne lasis la gastejmastron trankvila, ĝis ĉi tiu rakontis, ke ne malproksime estas malbenita kastelo, kie li povas lerni la timon, se li nur pasigos tie tri noktojn. La reĝo promesis al tiu, kiu kuraĝos tion fari, sian filinon kiel edzinon, kaj la filino estas la plej bela virgulino en la tuta mondo. En la kastelo estas ankaŭ grandaj trezoroj, gardataj de malbonaj spiritoj; oni povus akiri ilin kaj fariĝi riĉulo. Multaj kuraĝuloj jam estis interne, sed ankoraŭ neniuj eliris. En la sekvinta tago la knabo iris al la reĝo kaj diris: „Se vi permesos, mi pasigos tri noktojn en la kastelo.” La reĝo ekrigardis lin kaj ĉar la knabo plaĉis al li, li diris: „Vi povas peti tri aferojn, sed nur senvivajn objektojn,

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

kaj vi povos kunporti ilin en la kastelon." La junulo respondis: „Mi petas fajron, tornilon kaj lignaĵistan stablon kun tranĉilo.”

La reĝo ordonis ĉion ĉi porti tage en la kastelon. Kiam proksimiĝis la nokto, la knabo eniris en la kastelon, ekbruligis helan fajron en unu ĉambro, metis apude la stablon kun la tranĉilo, sidiĝis sur la tornilo kaj diris: „Ah, se mi timus! Sed ankaŭ ĉi tie mi ne lernos la timon.” Antaŭ noktomezo li volis flamigi la fajron: kiam li blovis, io ekkriis en angulo: „Miaŭ, miaŭ, kia malvarmo!” „Malsaĝuloj, kial vi krias? Venu al la fajro kaj varmigu vin.” Apenaŭ li tion diris, elsaltis du grandaj katoj, sidiĝis ĉe ambaŭ liaj flankoj kaj sovaĝe rigardis lin per siaj fajraj okuloj. Post momento, kiam ili jam varmigis sin, ili diris: „Kolego, ĉu vi ne volas ludi kartojn?” „Kial ne,” respondis li, „sed montru viajn piedojn!” Ili etendis siajn ungegojn. „Ah,” diris li, „kiel longaj ungoj! Atendu, mi devas ilin detranĉi.” Li kaptis ilin sur la nuko, sidigis sur la stablo, ŝraŭbis iliajn piedojn kaj diris: „Mi vidis fiajn fingrojn, mi jam ne volas ludi kun vi.” Li mortigis la katojn kaj ĵetis en akvon. Apenaŭ li kvietigis la du ludkunulojn kaj sidiĝis ĉe la fajro, el ĉiuj anguloj venis nigraj katoj kaj hundoj nigraj, ligitaj per fajraj ĉenoj, pli kaj pli multenombraj tiel, ke li ne povis forpuŝi ilin. Ili kriis terure, paŝis en la fajron, disĵetis la karbojn kaj volis estingi ĝin. Momenton li rigardis kviete, sed ili fine tedis lin, li kaptis la tranĉilon, ekkriis: „For, kanajloj!” kaj senkompatе hakis dekstren kaj maldekstren. Parto forkuris, parton li mortigis kaj ĵetis en la lageton. Kiam li revenis, li flamigis fajron el la eroj kaj varmigis sin. Kiam li sidis tiamaniere, liaj okuloj ne volis plu esti malfermitaj kaj li deziris dormi. Li ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis en la angulo grandan liton. „Ĝustatempe,” diris li kaj kuŝiĝis. Sed apenaŭ li fermis la okulojn, la lito ekveturis kaj veturis tra la tuta kastelo. „Bone, tre bone,” diris la knabo, „kuru rapide!” La lito ruliĝis kvazaŭ al ĝi estus jungitaj ses ĉevaloj, trans la sojlojn kaj ŝtuparojn, supren kaj malsupren. Subite, krak krak, ĝi renversiĝis kaj kuŝis sur li kvazaŭ monto. Sed li deĵetis kovrilojn

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

kaj kusenojn, eliĝis kaj diris: „Veturu, al kiu tio plaĉas.” Li kuŝiĝis ĉe la fajro kaj dormis ĝis la tagiĝo. Matene la reĝo venis kaj vidante lin kuŝanta sur la planko, pensis, ke la fantomoj mortigis lin kaj ke li estas malviva. „Domaĝe, tiel bela homo!” diris la reĝo. La junulo aŭdis tion, leviĝis kaj diris: „Ankoraŭ ne!” La reĝo ekmiris, sed ĝojis kaj demandis, kiel pasis la nokto. „Tre bone,” respondis la knabo, „pasis unu, pasos ankaŭ la ceteraj.” Kiam li venis en la gastejon, la mastro larĝe malfermis la okulojn: „Neniam mi supozis, ke mi ree vidos vin vivanta; nun vi ellernis la timon?” „Ne, ĉio estas vana. Se iu povus klarigi ĝin al mi!”

En la sekvinta nokto li ree iris en la malnovan kastelon, sidiĝis ĉe la fajro kaj rekomencis sian kanton: „Ah, se mi timus, se mi timus!” Kiam venis la noktomezo, eksonis bruo kaj krioj pli kaj pli laŭtaj. Post momento ĉio eksilentis; fine el la kamentubo aperis duono da homo kaj falis antaŭ li. „Tio ne sufiĉas,” kriis li, „kie estas la alia duono?” La bruo rekomenciĝis, io furioze kriiĝis, kaj la alia duono falis. „Atendu!” diris la junulo, „mi ekflamigos por vi la fajron.” Kiam li tion faris, li ekvidis, ke ambaŭ duonoj kuniĝis kaj terura homo sidis sur lia loko. La knabo diris: „Mi ne konsentas, la benko estas mia.” La homo volis lin forpuŝi, sed la knabo ne cedis, depuŝis la monstron kaj sidiĝis sur sia loko. Dume falis pli multe da homoj, unu post alia. Ili alportis naŭ kadavrajn krurojn kaj du kadavrajn kapojn, starigis la krurojn kaj ekludis keglojn. Ankaŭ la junulo ekdeziris ludi kaj demandis: „Aŭskultu, ĉu vi akceptos min?” „Jes, se vi havas monon.” „Mi havas sufiĉe da mono, sed viaj kegloj ne estas sufiĉe rondaj.” Li prenis la kapojn, metis ilin en la tornilon kaj rondiĝis. „Nun ili pli bone ruliĝos,” diris li „al la ludo!” Li ludis kun ili kaj perdis iom da mono, sed kiam la dekdua horo eksonoris, ĉio malaperis antaŭ liaj okuloj. Li kuŝiĝis kaj trankvile ekdormis. En la sekvinta tago venis la reĝo kaj demandis: „Kiel pasis la dua nokto?” „Mi ludis keglojn,” respondis

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

li, „kaj perdis kelke da heleroj.” „Vi do ne timis?” „Tute ne, gaje estis! Ah, se mi scius, kio estas la timo!”

En la tria nokto li ree sidiĝis sur sia benko kaj tediĝinta diris: „Ah, se mi timus!” En malfrua horo ses grandaj viroj venis kaj alportis ĉerkon. La knabo diris: „Certe tio estas mia kuzo, kiu mortis antaŭ kelke da tagoj,” faris invitan geston kaj ekkriis: „Venu, kuzeto, venu!” Ili metis la ĉerkon sur la plankon; li proksimiĝis kaj demetis la kovrilon: tie kuŝis malvivulo. La knabo tuŝis lian vizaĝon, sed ĝi estis malvarma kiel glacio. „Atendu,” diris li, „mi iom varmigis vin.” Li iris al la fajro, varmigis sian manon kaj metis ĝin sur la vizaĝon de l' mortinto, sed la kadavro restis malvarma. La knabo prenis ĝin el la ĉerko, sidiĝis ĉe la fajro, metis la malvivulon sur siajn genuojn kaj frotis ĝiajn brakojn por fluigi la sangon. Kiam tio ne efikis, li ekpensis: kiam du kuŝas kune en la lito, ili varmigas sin reciproke. Li do portis ĝin en la liton, kovris ĝin kaj kuŝiĝis ĉe ĝia flanko. Post momento la mortinto varmiĝis kaj komencis moviĝi. La knabo diris: „Vi vidas, kuzo, se mi ne estus vin varmiginta . . .” Sed la mortinto ekkriis: „Nun mi sufokos vin!” „Kio?” ekkriis la knabo. „Tia estas via danko? Vi tuj revenos en la ĉerkon!” Li levis la mortinton, ĵetis en la ĉerkon kaj fermis la kovrilon. La ses viroj ree aperis kaj forportis la ĉerkon. „Mi ne povas timi, neniam mi lernos ĉi tie la timon.”

Homo enpaŝis, pli alta ol ĉiuj aliaj, terura; li estis maljuna kaj havis longan blankan barbon. „Malnoblulo,” kriis li, „mi instruos al vi la timon: vi mortos.” „Ne rapidu,” respondis la junulo, „se mi devas morti, ni antaŭe preparolu la aferon.” „Vi tuj ekkonos la pezon de mia mano,” diris la monstro. „Atendu iom, ne fanfaronu; mi estas same forta kiel vi, eble pli forta.” „Tion mi vidos,” diris la maljunulo. „Se vi estas pli forta, mi lasos vin foriri. Venu kaj ni provu.” Tra mallumaj koridoroj li kondukis lin en forĝejon, prenis hakilon kaj per unu bato penetrigis la amboson en la teron. „Mi faros la samon pli bone,”

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

diris la knabo kaj iris al la alia amboso; la maljunulo proksimiĝis por rigardi, kaj lia blanka barbo pendis super ĝi. La knabo prenis la hakilon, dishakis la amboson kaj per la sama bato pinĉigis en ĝi la barbon de l' monstro. „Nun mi tenas vin, nun estas via



vico morti.” Li levis feran bastonon kaj komencis bati la maljunulon, ĝis ĉi tiu ekĝemis kaj petis kompaton, promesante al la junulo grandajn riĉaĵojn. La knabo eltiris la hakilon kaj liberigis lin. La maljunulo rekondukis lin en la kastelon kaj montris al li en kelo tri kestojn plenajn de oro: „Unu parto estas por la malriĉuloj, dua por la reĝo, tria por vi.” Dume la dekdua horo eksonoris, kaj la spirito malaperis. La knabo restis en la malumo. „Mi trovos la vojon,” diris li, palpis ĉirkaŭe, retrovis la ĉambregon kaj ekdormis tie ĉe sia fajro. En la sekvinta mateno la reĝo venis kaj diris: „Nun vi ellernis, kio estas la timo?” „Ne,” respondis la knabo. „Kiamaniere? Ĉi tie estis mia mortinta kuzo kaj venis barbulo, kiu montris al mi multe da mono en la kelo, sed neniu instruis al mi la timon.” La reĝo diris: „Vi liberigis la kastelon, vi edziĝos kun mia filino.” „Tre bone,” respondis la knabo, „tamen mi ne scias ankoraŭ, kio estas la timo.”

Oni alportis la monon kaj festis la edziĝon, sed la juna reĝo, kvankam li amis la edzinon kaj estis feliĉa, ĉiam ripetis: „Ah, se

FABELO PRI IU, KIU MIGRIS POR EKKONI LA TIMON

mi timus, se mi timus." Tio fine ektedis sin. Sia servistino diris: „Mi konas rimedon, li lernos la timon." Ŝi iris al la rivereto, kiu fluis tra la ĝardeno, kaj ordonis kapti sitelon da guĝonoj¹⁾. Nokte, kiam la juna reĝo dormis, la edzino detiris de li la kovrilon kaj elverŝis sur lin el la sitelo la akvon kun la guĝonoj; la fiŝetoj eksaltis ĉirkaŭ li. Li vekigis kaj ekkriis: „Ah, kiel mi timas, kiel im timas, kara edzino! Jes, nun mi scias, kio estas la timo."

1) Fiŝo: an, gudgeon, fr. goujon, germ. Gründling, it. ghizzo, pol. kielb, rus, piskarj.





Knabo-fingro

Foje vespere malriĉa kamparano sidis ĉe la fajrujo kaj miksis la karbojn, kaj lia edzino sidis kaj ŝpinis. Li diris: „Malĝoje estas, ke ni ne havas infanojn! Estas silente ĉe ni, dum en aliaj domoj estas gaje kaj brue.” „Jes,” respondis lia edzino kaj ekĝemis, „se ni havus nur unu solan, ne pli grandan ol fingro, mi estus kontenta, kaj ni kore amus ĝin.” Post iom da tempo la virino ekmalsanis kaj post sep monatoj naskis infanon, kies ĉiuj membroj estis normalaj, sed kiu ne estis pli alta ol dika fingro. La gepatroj diris: „Ĝi estas, kian ni deziris; ĝi estos nia amata filo,” kaj ili nomis lin Knabo-Fingro. La nutraĵo ne mankis al li, tamen la infano ne kreskis kaj restis same granda, kiel en la unua horo. Malgraŭ tio li saĝe rigardis la mondon kaj baldaŭ montris siajn spritecon kaj lertecon: li estis kreaĵo, kiu sukcesadis en ĉiuj entreprenoj.

Foje la kamparano, intencante iri arbaron por dehaki arbojn, diris al si mem: „Se mi havus iun, kiu alkondukus veturilon.” „Patro,” ekkriis Knabo-Fingro, „mi alkondukos ĝin, fidu al mi, la veturilo estos ĝustatempe en la arbaro.” La kamparano ridis kaj diris: „Tio ne estas ebla, vi estas tro malgranda por konduki la ĉevalon.” „Ne grave, ne grave, patro; se la patrino nur jungos la ĉevalon, mi eksidos en ĝia orelo kaj krios, kien ĝi devas iri.” „Bone,” respondis la patro, „unu fojon ni povas provi.” Kiam venis la horo, la patrino jungis la ĉevalon kaj metis Knabon-Fingron en ĝian oreleon, kaj la etulo kriis la direkton. La ĉevalo obeis lin, kvazaŭ veran veturigiston, kaj iris ĝustan vojon al la arbaro. Kiam la knabo kriis por turni ĉe angulo, du

KNABO-FINGRO

fremduloj pasis tie. „Granda Dio!” diris unu, „kio estas tio? Jen ĉaro veturas, veturigisto krias al la ĉevalo, sed oni vidas neniun.” „Suspektinda afero,” diris la alia, „ni sekvu la ĉaron, ni vidos, kie ĝi haltos.” La ĉaro enveturis en la arbaron kaj ĝuste al la loko, kie oni dehakis la arbojn. Kiam Knabo-Fingro ekvidis la patron, li vokis: „Jen mi estas kun la ĉaro, nun elprenu min.” La patro tenis la ĉevalon per la maldekstra mano kaj per la dekstra elprenis la fileton el la orelo. La knabo eksidis gaje sur pajla trunketo. Vidante Knabon-Fingron, la fremduloj pro miro ne sciis kion diri. Unu kondukis la alian flanken kaj diris: „Aŭskultu, la etulo povus alporti al ni grandegan profiton, se ni montrus lin en granda urbo por mono: ni aĉetu lin.” Ili revenis al la kamparano kaj diris: „Vendu al ni la hometon, li vivos feliĉe ĉe ni.” „Ne,” respondis la patro, „li estas parto de mia propra koro, mi ne vendos lin por la tuta oro de l' mondo.” Sed Knabo-Fingro, aŭdinte pri la marĉando, rampis sur la faldoj de l' patra vesto ĝis lia ŝultro kaj murmuretis al li en la orelon: „Patro, vendu min, mi revenos al vi.” Tiam la patro vendis lin al la fremduloj por bela peco da oro. „Kie vi volas sidi?” demandis ili la knabon. „Metu min sur la randon de via ĉapelo, tie mi povos promeni kaj rigardi la ĉirkaŭaĵon; mi ne falos.” Ili plenumis lian deziron, kaj kiam Knabo-Fingro adiaŭis la patron, ili foriris. Mallumiĝis. La knabo diris: „Mallevu min, necese estas.” „Restu supre,” diris la homo, sur kies kapo li sidis, „indiferente estas por mi, ankaŭ la birdoj lasas iafoje ion sur mia ĉapelo.” „Ne, ne”, diris Knabo-Fingro, „mi scias, kio estas deca; rapide demetu min.” La fremdulo demetis la ĉapelon kaj sidigis la etulon sur plugokampo ĉe la vojo. Li kuris momenton inter la terbuloj kaj subite englitis en musan truon, kiun li serĉis. „Bonan vesperon, sinjoroj, iru hejmen sen mi,” kriis li kaj ridis ilin. Ili alkuris kaj pikis en la truon per bastono, sed vane: Knabo-Fingro rampis pli kaj pli profunde; baldaŭ fariĝis tute mallume kaj ili devis reveni koleraĵ kaj kun malplena sako.

Kiam Knabo-Fingro rimarkis, ke ili estas for, li elrampis el la


KNABO-FINGRO

subtera nesto. „Dangere estas iri sur la plugokampo en mallumo,” diris li, „baldaŭ rompita estas kolo aŭ kruro!” Feliĉe li renkontis malplenan limakan domon. „Benata estu Dio,” diris li, „ĉi tie mi povas trankvile pasigi la nokton,” kaj eniris. Baldaŭ, kiam li estis ekdormonta, li aŭdis interparoladon de du pasantoj. Unu diris: „Kion ni faros por ŝteli la monon kaj arĝenton de l’ riĉa paroĥestro?” „Mi povas diri tion al vi,” ekkriis Knabo-Fingro. „Kio estis?” diris la terurita ŝtelisto, „iu parolis, mi aŭdis.” Ili haltis kaj aŭskultis. Knabo-Fingro daŭrigis: „Kunprenu min, mi vin helpos.” „Kie vi estas?” „Serĉu sur la tero kaj atentu, de kie la voĉo venas,” respondis li. Fine la ŝtelistoj trovis lin kaj levis. „Vi malgranda pupo, vi nin helpos?” diris ili. „Aŭskultu, mi eniros tra la krado en la kameron de l’ paroĥestro kaj donos al vi, kion vi deziras.” „Bone,” diris ili, „ni vidos vian kapablon.” Kiam ili venis en la paroĥan domon, Knabo-Fingro enrampis en la kameron kaj tuj komencis krei kiel freneza: „Ĉu vi volas havi ĉion, kio estas ĉi tie?” La ŝtelistoj ektimis kaj diris: „Parolu mallaŭte, vi vekos ĉiujn.” Sed Knabo-Fingro ŝajnis, ke li ne komprenas, kaj ripetis: „Kion vi volas, ĉu vi volas havi ĉion, kio estas ĉi tie?” La kuiristino, kiu dormis en apuda ĉambro, aŭdis tion, leviĝis sur la lito kaj aŭskultis. La ŝtelistoj pro timo forkuris, sed kuraĝiĝinte ekpensis: „La hometo volas moki nin.” Ili revenis kaj murmuretis al li: „Ĉesu ŝerci kaj donu al ni ion.” Knabo-Fingro ekkriis tiel laŭte, kiel li povis: „Mi ja volas doni al vi ĉion, nur etendu la manojn.” La aŭskultanta servistino aŭdis tion tute klare, saltis de la lito kaj kuris al la pordo. La ŝtelistoj forkuris kaj galopis kvazaŭ ĉasataj de l’ diablo. La kuiristino povis nenion vidi kaj iris eklumigi kandelon. Kiam ŝi revenis kun ĝi, Knabo-Fingro ne rimarkite sin kaŝis en la garbejon. La kuiristino serĉis en ĉiuj anguloj kaj, trovinte nenion, revenis en la liton kaj pensis, ke ŝi sonĝis kun malfermitaj okuloj kaj oreloj.

Knabo-Fingro vagis en la fojno kaj fine trovis belan lokon por dormo; li intencis bone ripozi ĝis la tagiĝo kaj matene reiri al la gepatroj. Sed alion volis la sorto! Multe da malfeliĉo kaj

KNABO-FINGRO

malĝojo ekzistas en la mondo! La servistino leviĝis ĉe la matenruĝo por nutri la brutojn. Ŝi iris antaŭ ĉio en la garbejon, prenis fojnon kaj ĝuste tiun, en kiu kuŝis la kompatinda Knabo-Fingro.



Li dormis tiel profunde, ke li rimarkis nenion kaj vekigis nur en la buŝego de bovino, kiu prenis lin kun la fojno. „Ah, Dio,” ekkriis li, „kiamaniere mi falis en fulejon” ¹⁾, sed baldaŭ li komprenis la situacion. Li bone atentis por ne veni inter la dentojn, kie li estus frakasata, tamen fine li glitis en la stomakon. „Oni forgesis fari fenestrojn en la ĉambreto,” diris li, „la suno ne lumas ĉi tien, kaj oni ne alportas kandelon.” La loĝejo tute malplaĉis al li kaj plej malagrabla estis, ke senĉese venis pli kaj pli multe da fojno tra la pordo kaj la spaco fariĝis pli kaj pli malvasta. Fine terurita li ekkriis plej laŭte: „ĉesu doni fojnon, ĉesu doni fojnon.” En la sama momento la servistino melkis la bovinon; vidante neniun kaj aŭdante voĉon, la saman voĉon, kiu kriis nokte, la kuiristino tiel ektimis, ke ŝi falis de l' seĝeto kaj disverŝis la lakton. Rapide, rapide ŝi kuris al sia sinjoro kaj kriis: „Ah, Dio! sinjoro pastro, la bovino parolas!” „Vi frenezigis,” diris la paroĥestro, kaj li mem iris en la stalon por vidi, kio okazas tie. Apenaŭ li metis tie la piedon, Knabo-Fingro ree ekkriis: „Ĉesu doni fojnon, ĉesu doni fojnon!” Tiam la paro-


1) an. fulling-mill; fr. moulin à foulon; germ. Walkmühle.

KNABO-FINGRO

Ĥestro mem ektimis, pensis, ke diablo ekloĝis en la bovino kaj ordonis buĉi ŝin. Oni buĉis ŝin kaj la stomakon, kie sidis Knabo-Fingro, oni ĵetis sur la sterkon. Malfacila afero estis sin liberigi, tamen Knabo-Fingro jam sukcesis eligi la kapon, kiam nova malfeliĉo okazis. Malsata lupo alkuris kaj englutis per unu fojo la tutan stomakon. Knabo-Fingro ne perdis la kuraĝon. „Eble,” pensis li, „mi povos trakti kun ĝi,” kaj li kriis al ĝi el la ventro: „Kara lupo, mi havas por vi bonan manĝon.” „Kie mi trovos ĝin?” demandis la lupo. „En tiu kaj tiu domo, vi devas enrampi tra la defluilo, vi trovos tie kukojn, lardon kaj kolbasojn, tiom kiom vi volos,” kaj li montris al li precize la vojon al la gepatra domo. Li ne bezonis diri tion dufoje al la lupo. La avida besto sin enigis nokte tra la defluilo kaj manĝis en la kamero, ne ŝparante la provizojn. Kiam ĝi satmanĝis, ĝi volis eliri, sed ĝi fariĝis tro dika kaj ne povis eligi tra la sama truo. Knabo-Fingro atendis tion kaj komencis fari grandan bruon en la ventro de l' besto; li kriis kiel freneza. „Eksilentu,” diris la lupo, „vi vekos la homojn.” „Ne grave, ne grave,” respondis la etulo, „vi satmanĝis, ankaŭ mi volas amuziĝi” kaj rekomencis la kriadon. Fine liaj gepatroj vekiĝis, kuris al la kamero kaj rigardis internen tra fendo. Ekvidinte tie la lupon, ili alportis armilojn, li hakilon, ŝi falĉilon. „Staru post mi,” diris la kamparano, kiam ili revenis en la kameron, „se ĝi ne mortos pro mia bato, tratanĉu al ĝi la ventron.” Knabo-Fingro aŭdis la voĉon de l' patro kaj ekkriis: „Kara patro, mi estas ĉi tie, mi sidas en la ventro de la lupo.” La patro ĝoje diris: „Dank' al Dio, nia kara infano estas retrovita,” kaj li ordonis al la edzino formeti la falĉilon por ne vundi la filon. Poste li levis la hakilon kaj per unu bato sur la kapon mortigis la beston. Ili alportis tondilon kaj tranĉilon, tratanĉis ĝian ventron kaj eltiris la knabon. „Ah,” diris la patro, „kiel ni ĉagreniĝis pro vi!” „Jes, patro, mi multe migris en la mondo; fine, dank' al Dio, mi ree spiras freŝan aeron.” „Kie vi estis, filo?” „Mi estis en musa truo, en stomako de bovino kaj en ventro de lupo; nun mi restos ĉe vi.” „Kaj ni ne vendos vin

KNABO-FINGRO

por la tuta oro de l' mondo," diris la gepatroj, karesis kaj kisis sian amatan Knabon-Fingron. Ili donis al li manĝaĵon kaj trinkaĵon, kaj mendis por li novajn vestojn, ĉar la liaj estis tute eluzitaj dum la vojaĝo.



SES OPE ONI TRAIRAS TUTAN MONDON LA



Estis iam homo, lerta en multaj metioj. Li estis soldato, servis brave kaj kuraĝe, sed post la milito li ricevis eksigon kaj tri helerojn por la vojaĝaj elspezoj hejmen. „Atendu,” diris li, „tio ne plaĉas al mi; se mi trovos taŭgajn kamaradojn, mi devigos la reĝon doni al mi la trezorojn de la tuta regno.” Li ekiris kolera en la arbaron kaj vidis tie homon, kiu ĵus elŝiris ses arbojn, kvazaŭ herbajn trunketojn. Li demandis: „Ĉu vi volas esti mia servisto kaj sekvi min?” „Jes,” respondis tiu, „sed antaŭe mi devas alporti al mia patrino la branĉfaskon” kaj li zonis per unu arbo la kvin ceterajn, levis la faskon kaj foriris. Post momento li revenis kaj aliĝis al la soldato, kiu diris: „Duope ni trairos la tutan mondon.” Post iom da tempo ili renkontis ĉasiston, kiu genuis, tenis pafilon kaj celis. La soldato demandis: „Kion vi celas, ĉasisto?” Li respondis: „Du mejlojn de ĉi tie sur branĉo de kverko sidas muŝo, mi volas trafi ĝian maldekstran okulon.” „Iru, iru kun mi,” diris la soldato, „triope ni trairos la tutan mondon.” La ĉasisto konsentis, ekiris kun li, kaj ili venis al sep ventomuelejoj, kies flugiloj rapide turniĝis, kvankam vento blovis de nenie kaj neniu folio moviĝis. La soldato diris: „Mi ne scias, kio turnas ilin, la aero ja estas senmova,” kaj ekiris antaŭen kun la servistoj. Du mejlojn de tie ili ekvidis homon, kiu sidis sur arbo, ŝtopis unu naztruon kaj blovis per la alia. „Kion vi faras tie?” demandis la soldato. „Du mejlojn de ĉi tie staras sep ventomuelejoj, mi blovas por turni la flugilojn.” „Iru, iru kun mi,”

SESOPE ONI TRAIRAS LA TUTAN MONDON

diris la soldato, „kvarope ni trairos la tutan mondon.” La blovulo malsupreniris kaj aliĝis al la soldato. Post iom da tempo ili renkontis homon, kiu staris sur unu piedo, la alian li malkroĉis kaj metis apud si. La soldato diris: „Vi komforte aranĝis la aferon por ripozi.” „Mi estas kurulo,” respondis li, „mi malkroĉis unu piedon por kuri ne tro rapide; per du piedoj mi kuras pli rapide ol birdo.” „Iru, iru kun mi, kvinope ni trairos la tutan mondon.” Li aliĝis al la soldato. Post iom da tempo ili renkontis homon, kiu havis ĉapeleton metitan sur unu orelon. La soldato diris: „Malgraŭ mia respekto, mi devas diri, ke kun via ĉapelo vi similas pajaĉon, — ne metu vian ĉapelon sur unu orelon.” „Nenio estas farebla,” diris li, „se mi metas la ĉapelon rekte, venas tia frostoj, ke la birdoj sub la ĉielo glaciigas kaj falas teren senvivaj.” „Iru, iru kun mi,” diris la soldato, „sesope ni trairos la tutan mondon.”

La seso venis en urbon, en kiu la reĝo anoncis, ke tiu, kiu venkos lian filinon en vetkurado, edziĝos kun ŝi; sed se li estos venkita, li perdos la kapon. La soldato sin prezentis kaj diris: „Anstataŭ mi, kuros mia servisto.” La reĝo respondis: „Bone, sed tiam ankaŭ lian kapon vi donu kiel garantion.” Kiam ili interkonsentis, la soldato alkroĉis al la kurulo la piedon kaj diris: „Rapidu kaj penu venki.” Oni interkonsentis, ke venkos tiu, kiu unua alportos akvon el malproksima puto. La kurulo ricevis kruĉon, la reĝidino alian kaj ili ekkuris samtempe; sed post momento, kiam la reĝidino faris apenaŭ kelke da paŝoj, la kurulo ne estis plu videbla; ŝajnis, ke vento preterpasis. Baldaŭ li atingis la puton, ĉerpis plenan kruĉon kaj reiris. Sed en la mezo de l' revena vojo li eksentis laciĝon, metis la kruĉon sur la teron kaj ekkuis por dormi. Li metis sub la kapon ĉevalan kranion por baldaŭ vekigi pro la malmoleco de l' kuseno. Dume la reĝidino, kiu ankaŭ kuris rapide, kiel tio estas ebla por ordinara homo, atingis la puton kaj rapidis hejmen kun plena kruĉo. Kiam ŝi venis al la dormanta kurulo, ŝi ekĝojis kaj diris: „La malamiko estas en miaj manoj,” malplenigis lian kruĉon kaj daŭrigis la

SESOPE ONI TRAIRAS LA TUTAN MONDON

vojon. Ĉio estus perdita, sed feliĉe la ĉasisto staris sur la supro de l' kastelo kaj vidis ĉion per siaj penetremaj okuloj. Li diris: „La reĝidino ne devas nin venki,” ŝargis la pafilon kaj per lerta pafu forpuŝis la kranion, sur kiu kuŝis la kapo de l' kurulo, eĉ ne tuŝetinte lin mem. La kurulo vekigis, salte leviĝis kaj rimarkis, ke lia kruĉo estas malplena kaj al reĝidino jam preterpasis lin. Sed li ne perdis la kuragon, ree kuris al la puto, plenigis la kruĉon kaj revenis al la kastelo dek minutojn pli frue ol la reĝidino. „Fine,” diris li, „mi vere movis la piedojn; tion, kion mi faris antaŭe, oni ne povas nomi kurado.”

La reĝo kaj precipe la reĝidino koleris, ke simpla eksigita soldato venkis en la veto; ili interkonsiliĝis, kiamaniere liberiĝi de li kaj de liaj kamaradoj. La reĝo diris al ŝi: „Mi trovis rimedon, estu trankvila, ni ne vidos ilin plu.” Li diris al ili: „Nun vi kune manĝos, trinkos kaj amuziĝos,” kaj kondukis ilin en ĉambrom, kies planko kaj muroj estis feraj kaj kies fenestroj havis ferajn kradojn. En la ĉambro estis tablo ŝargita per bonegaj manĝaĵoj. La reĝo diris: „Eniru kaj regalu vin.” Kiam ili ekvidis ĉe la tablo, oni fermis kaj riglis la pordon. Poste li alvokis la kuiriston kaj ordonis al li tiel longe hejti sub la planko, ĝis la fero fariĝos ruĝa. La kuiristo plenumis la ordonon, kaj al la sidantoj ĉe la tablo fariĝis varme. Ili pensis, ke tion kaŭzis la manĝado, sed kiam la varmego fariĝis pli kaj pli granda kaj ili volis eliri, sed trovis la pordojn kaj fenestrojn fermitaj, tiam ili komprenis, ke la reĝo havas malbonajn intencojn kaj volas ilin sufoki. „Li ne sukcesos,” diris la kamarado kun la ĉapelo, „mi faros tian froston, ke la varmego forkuros kun honto.” Li metis la ĉapelon rekte kaj tuj venis tia frosto, ke la varmego malaperis kaj la manĝaĵo sur la pladoj komencis glaciigi. Post kelke da horoj la reĝo, certa, ke ili jam estas tute bakitaj, ordonis malfermi la pordon por mem vidi ilin. Sed kiam oni malfermis la pordon, ĉiuj ses staris freŝaj kaj sanaj kaj diris, ke ili eliras kun plezuro por sin varmigi, ĉar en la ĉambro pro la granda frosto la manĝaĵoj glaciigis sur la pladoj. La reĝo kolera iris malsupren al la kuiristo, insultis lin

SESOPE ONI TRAIRAS LA TUTAN MONDON

kaj demandis, kial li ne plenumis la ordonon. La kuiristo respondis: „Mi hejtis sufiĉege, vidu vi mem.” La reĝo vidis, ke grandega fajro brulas sub la fera ĉambro kaj komprenis, ke lia ruzo estis vana.

Li senĉese meditis, kiamaniere liberiĝi de la maloportunaj gastoj, alvokis la soldaton kaj diris: „Se vi rezignos la rajtojn al mia filino, vi ricevos tiom da oro, kiom vi volos.” „Volonte, Via Reĝa Moŝto,” respondis li, „donu al mi tiom da oro, kiom povos porti mia servisto, kaj mi ne postulos plu vian filinon.” La reĝo konsentis, kaj la soldato daŭrigis: „Mi venos preni la oron post du semajnoj.” Li kunvokis ĉiujn tajlorojn de la tuta regno kaj ordonis al ili kudri grandegan sakon dum du semajnoj. Kiam ĝi estis preta, la fortegulo, kiu povis elŝiri arbojn, metis ĝin sur la ŝultron kaj iris al la reĝo. La monarĥo diris: „Kiu estas la grandegulo, kiu portas sur la ŝultro pakon da tolo grandan, kiel domo?” Li ektimis kaj pensis: „Kiom da oro li fortrenos!” Li ordonis alporti barelon da oro, kiun devis porti dek ses plej fortaj viroj; la fortegulo levis ĝin per unu mano, metis en la sakon kaj diris: „Kial vi ne alportas pli multe per unu fojo? Tio ĉi ne kovras eĉ la fundon.” Iom post iom la reĝo ordonis alporti tutan sian trezoron, la fortegulo ŝovis ĝin en la sakon, sed ĝi ne plenigis eĉ la duonon: „Donu pli multe,” kriis li, „kelke da pecetoj ne sufiĉas por plenigi la sakon.” Oni devis venigi ankoraŭ sep mil veturilojn ŝarĝitajn per oro; la fortegulo metis ilin en la sakon kun la aljungitaj bovoj. „Mi ne esploras longe,” diris li, „kaj prenas ĉion, kio venas, por plenigi la sakon.” Kiam li enmetis ĉion, la sako ankoraŭ ne estis plena. „Oni devas fini,” diris li, „oni ja povas ligi sakon, eĉ se ĝi ne estas plena.” Li metis ĝin sur la dorson kaj foriris kun la kamaradoj.

La reĝo, vidante, ke unu homo forportas la riĉaĵojn de la tuta lando, ekkoleris kaj sendis sian kavalerion kun ordono kapti la fortegulon kaj forpreni de li la sakon. Du regimentoj baldaŭ atingis ilin kaj kriis al ili: „Vi estas kaptitoj, redonu la sakon kun la oro, alie, vi perdos viajn kapojn.” „Kion vi diras?”

SESOPE ONI TRAIRAS LA TUTAN MONDON

diris la blovulo, „ni estas kaptitoj? Antaŭe vi ĉiuj dancos en la aero.” Li ŝtopis unu naztruon kaj per la alia ekblovis sur la regimentojn. Ili disflugis en la aeron super la montojn kaj valoĵn. Iu serĝento petis pardonon, kriante, ke li havas naŭ cikatrojn kaj estas brava homo, kiu ne meritis tian honton. La blovulo iom haltis, kaj la serĝento sendifekta falis teren. „Iru al la reĝo kaj diru, ke li sendu pli multe da rajdantoj, ili ĉiuj dancos en la aero,” diris la lertulo. Kiam la reĝo eksciis ĉion, li diris: „Lasu ilin, ili scias la sorĉarton.” La seso forportis la riĉaĵojn hejmen, dividis ilin kaj vivis feliĉe ĝis la morto.





Tri fratroj

Estis iam homo, kiu havis tri filojn. Ekster domo, en kiu li loĝis, li posedis nenion. Ĉiu el la filoj dezirus heredi ĝin, sed la patro amis ĉiujn same kaj li ne sciis kion fari por ne esti maljusta; plej simple estus vendi la domon kaj dividi la monon, sed li ne volis tion fari, ĉar ĝi estis hejmo de liaj patroj kaj prapatroj. Fine li trovis rimedon kaj diris al la filoj: „Iru en la mondon, provu viajn kapablojn kaj lernu ĉiu metion; kiam vi revenos, tiu ricevos la domon, kiu faros plej bonan majstroverkon.”

La filoj konsentis. La plej aĝa decidis fariĝi forĝisto, la dua barbiro, la tria skermisto. Ili difinis la tagon de l' reveno kaj foriris. Feliĉe ĉiu trovis bonan majstron kaj plene ellernis sian metion. La forĝisto subforĝis la ĉevalojn de l' reĝo kaj pensis: „Farita estas la afero, la domo estas via.” La barbiro razis nur altrangulojn kaj pensis la samon. La skermisto ricevis multe da batoj, sed li kunpremis la dentojn kaj ne ĉagreniĝis, ĉar li pensis: „Se vi timos batojn, vi neniam ricevos la domon.” Kiam pasis la difinita tempo, ili revenis al la patro; sed ili ne sciis kiamaniere trovi plej bonan okazon por montri sian arton, sidis kune kaj interkonsiliĝis. Subite ili ekvidis leporon, trakurantan la kampon. „Jen ĝi venas kvazaŭ invitita”, diris la barbiro, prenis sian pladeton kaj sapon, ŝaŭmigis ĝin, ĝis la leporo proksimiĝis, poste dum ĝia kurado sapumis ĝin kaj razis ĝian barbon: li ne vundetis ĝin, nek kaŭzis doloron. „Tio plaĉas al mi,” diris la patro, „se

TRI FRATOJ

viaj fratoj ne estos pli lertaj, la domo estos via." Post momento galope preterveturis sinjoro en kaleŝo. „Nun vi vidos, patro, kion mi scias," diris la forĝisto, kuris al la kaleŝo, deŝiris de la galopanta ĉevalo la kvar hufojn kaj alnajlis kvar novajn. „Brave," diris la patro, „vi ne estas malpli lerta ol via frato; mi ne scias, al kiu mi devas doni la domon." La tria diris: „Permesu ankaŭ al mi, montri mian arton." Ekpluvis, la skermisto eltiris la spadon kaj eksvingis ĝin super la kapo: neniuj gutoj falis sur lin. La pluvo pligrandigis kaj fine la akvo fluis kvazaŭ el kuvo: la skermisto svingis la spadon pli kaj pli rapide kaj restis tute seka kvazaŭ sub tegmento. Ekmiregis la patro, vidante tion kaj diris: „Vi faris plej bonan majstroverkon, la domo estas via."

La du aliaj akceptis la verdikton sen protesto. Ĉar ĉiuj tri amis unu la alian, ili restis en la domo kaj ĉiu laboris en sia metio; kiel lertaj specialistoj ili havis grandan klientaron. Ili vivis feliĉe ĝis maljuna aĝo, kaj kiam unu malsaniĝis kaj mortis, la du aliaj tiel ĉagreniĝis, ke ankaŭ ili malsaniĝis kaj mortis. Ĉiujn tri, ĉar ili estis tiel lertaj kaj tiel amis unu la alian, oni metis en unu tombon.

fino

RIMARKOJ DE LA LITERATURA KOMITATO.

Kontroli libron por dua eldono ŝajnas ne tiom malfacile, kiom kontroli manuskripton antaŭ unuafoja presiĝo. En vero tia tasko estas malfacila, precipe, se temas pri traduko de klasika stilisto kia Kabe.

Trarigardante tiun ĉi tradukon, ni spertis denove tian malfacilon. Dezirante aperigi verketon en pura Esperanta vesto, ni tamen ne rajtis ŝanĝi kaj korekti ĉiujn formojn, kiuj ŝajnis al ni riproĉindaj, ĉar ĉi foje ni ne povis peti la aprobon de l' tradukinto, nek konsili al li. Kaj krom tio la stilon kaj lingvaĵon de stilisto kia Kabe ni ne rigardu per okuloj de nuntempa esperantisto, sed necesas image prezenti al si la komencan tempon de nia literaturo por kompreni la klasikajn formojn en lingvaĵo de Kabe. Grefti formojn, nuntempe konsideratajn plej korektaj, sur trunkon tiutempan ne decas. Pro tio ni komencis tiun ĉi kontrolan taskon kun la antaŭe farita intenco fari kiom eble plej malmulte da ŝanĝoj kaj korekti nur tion, kio estas logike kaj gramatike nepre erara kaj ni klopodis konsekvence modifi tiujn formojn, en kiuj la tradukinto pro kiu ajn kaŭzo agis ne konsekvence. La leganto do ne miru, trovante en tiu ĉi eldono plurajn esprimojn kritikindajn, sed konsideru, ke la traduko estis farata en tempo, kiam plurajn lingvajn elementojn oni rigardis alimaniere ol nun.

Ni estas certaj, ke per nia laboro la stilo kaj lingvaĵo de Kabe ne estas tuŝitaj; male, ke tiuj formoj, kiuj ne estis tute glataj, per zorga kaj skrupule preciza kontrolo fariĝis tiom precizaj, kiom eblas en la kadro de klasika traduko.

Ni ne detale menciuj la multajn formojn kaj esprimojn, kiuj ŝajnis al ni korektindaj, sed kiujn ni pro la jam nomita motivo tamen ne ŝanĝis; el ili ni menciuj nur:

alie (kun signifo ne de alie, sed de sene aŭ por ke) — tiam (kun signifo de tiuokaze) — tiel kaj kiel (anst. tia kaj kia) — tiel kaj kiel (anst. tiom kaj kiom) — foje (oftege uzita kun la senco de iam) — kovrita de polvo k.s. (formo el logika vidpunkto kritikenda, sed ĉe Kabe kaj aliaj klasikuloj ofte trovata) — tiu ĉi foje (ĉi tiu foje) — reĝino (anst. reĝidino, evidente intence uzita por rimo kaj ritmo).

Ĉi sube ni menciuj la korektojn, kiujn ni devis fari:

Erare uzitaj vortoj: ŝpari (indulgi) — helpi (efiki) — foje (oble) — regni (regi) — tra (inter, trans) — ke (pro kio, ĉar) — koni (scii) — de (pro) — ŝargi (ŝargi) — hepato (koro) —

RIMARKOJ DE LA LITERATURA KOMITATO

sukcesi (prosperi) — iupo (vulpo) — tiel (tre) — li (ĝi) —
ĵus (ĝuste) — maldormi (pasigi) — konfidi (fidi) — nun
(nu) — kapabla (lerta) — plune (jam ne) — saponi (sapumi).

Ne regule, sed nur en okazo de nepra neceso ni ŝanĝis:

kiel (kia) — kiel (kvazaŭ) — nenion (neniom) — kion
(kiom).

Forgesitan afikson ni aldonis aŭ erare uzitan forstrekis en:

edziĝa (geedziĝa) — dungi (dungigi) — abomena (abo-
meninda) — malkareco (kareco).

Gramatikajn erarojn ni korektis en:

englutis ilin vivantajn (vivantaj) — alten (alte,
supren) — vidi malproksime (malproksimen) — apogi
sin sur lambastonon (lambastono) — ne grava (grave)
— ilia malbono kaj malsincereco estas punita (iliaj
... punitaj) — ioo nokto (noktoj) — lasi lin en mia
domo (domon) — kaj kelke da similaj kazaj eraroj.

Sekve de antaŭa kritiko pri neŝanĝo ni nun ŝanĝis:

nigrhara (nigrahara).

Kelklöke ni trastrekis erare uzitan artikolon aŭ aldonis mankantan.

Por plifaciligi komprenon ni aldonis vorton en:

ĝi volis (leviĝi) sur la tablon — (iu) patro — kuŝiĝis
(por) dormi — (pied) - fingro.

Fine ni korektis kelkajn evidentajn erarojn pri neĝuste uzita tempoformo de
verbo, ŝanĝis kelkfoje la lokon de adverbo kaj forigis kelke da preseraroj.

Ni ankoraŭ aldonu, ke kelkies kritikon, faritan pri nia antaŭa kontrolo pri alia
traduko de Kabe, „Patroj kaj Filoj”, ni utiligis al ni, esperante per tio kontentigi
amantojn de niaj klasikuloj.

LITERATURA KOMITATO F.L.E.